

1983 oktobro
76a jaro
n-ro 934 (10)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



**Amika
vizito
en
Pekino**

Vi trovos,

ke ni en ĉi tiu numero faras provon rekapti nian normalan eksterkongresan movadan vivon. Ni ne tute sukcesas. Restis tiom da kongresanoj, ke ili lasis lokon al nenia recenzo, ekzemple. Infana Kongreseto okupis la lokon de TEJO-paĝo, teatro malhelpis aperigi nekrologojn, kotiztabelo amputis la rubrikon Loke — Fake — Persone. Espereble, novembro portos al vi tute trankvilan revunumeron, kvankam restas ankoraŭ pluraj aspektoj de la grandioza Kongreso en Budapeŝto, kiujn ni devos iel-tiel tuŝi, poste. Sed nun, senrigarde al tio, ĉu vi estas norde aŭ sude, ĉu aŭtunas aŭ printempas nun ĉe vi — memoru, ke vi staras ĉe la komenco de nova laborsezono. Ni provis peri al vi sufiĉe da inspiro, kiun al ni ĉiuj liveris Budapeŝto. Skribu pri viaj planoj kaj fartu diligente!

Enhavo

- 161 Alvoko de la Estraro de UEA pri la Centjara Jubileo de Esperanto: Kreiĝas Internacia Jubilea Fondaĵo
- 162 Virina agado: Seminario pri publika parolado (Julie Tonkin)
- 163 Oficiala renkontiĝo; Aplikado: Esperanto samrange kiel du aliaj lingvoj
- 164 Faka agado: Planoj por restrukturi ISAE (C. Darbellay)
- 165 Afriko: Kursosvarmo en Zairio
- 166 Belartaj Konkursoj 1984: Nova branĉo: Kanto (Baldur Ragnarsson)
- 167 Lingvo: *Preferi ol aŭ preferi al* (Bernard Golden)
- 168 Kongresa temo: Ampleksa pritrakto en multaj prelegoj, konferenco kaj debato (H.M. Maitzen)
- 170 Teatro: Festivalo ene de la Kongreso
- 172 Artaj aranĝoj: Vario, kiu foje troas
- 173 Pedagogia programo: Seminario en Gyula, Tago en Budapeŝto
- 174 20a Internacia Infana Kongreseto: Granda intereso pri la infanaj aranĝoj; Kongresa komunikado
- 176 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 178 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA
- 179 Kotiztabelo por 1984
- 180 Anoncetoj

La kovrilo

Esperanto neniam havis multajn amikojn inter la gravaj politikistoj, ĉar ni ne estas potenco, kaj ili neniam sukcesis kompreni kia potenco Esperanto foje estos. Des pli valoraj por ni estas tiuj kelkaj elstaraj politikistoj (Franz Jonas, Josip Broz Tito, Willem Drees), kiuj tiel amikis kun la zamenhofa lingvo, ke ili mem lernis ĝin. Ni nun havas novan amikon inter la aktivantaj politikistoj: Ingemund Bengtsson, prezidanto de la Sveda Parlamento, ĵus elektita en la Honoran Patronan Komitaton de UEA. Bengtsson iris pasintmonate al Ĉinio kaj trovis tempon tie renkonti esperantistojn. Jen li admiranta ĉinajn eldonaĵojn en Esperanto (supre maldekstre), salutanta Chu Tunan, ĉinan politikiston, kiu prezidas la societon "Amikoj de Esperanto" (dekstre), konversacianta kun funkciuloj de Ĉina Esperanto-Ligo (sube). Ni ne dubas, ke la pekina vizito (legu pri tio pli sur la paĝo 162) firmigis la rilatojn inter Svedio kaj Ĉinio, same kiel ni certas, ke ĝi firmigis la amikecon inter Bengtsson kaj Esperanto. Kiam oni serioze konatiĝas kun Esperanto, ne eblas malamiki al ĝi.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefona: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterkovrilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Yosimi Umeda, Tabata 1-28-13-206, Kita-ku, Tôkyô, 114, Japanio; ☎ (03) 828 6603.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 30 Blvd. de Strasbourg, F-94130 Nogent sur Marne, Francio; ☎ (1) 873 18 27.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): ing. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Kreiĝas Internacia Jubilea Fondaĵo


La Esperanto-movado nun estas nur kvar jarojn de la Jubilea Jaro 1987, kiam ni ĉiuj festos la centan datrevenon de la ekzisto de la Internacia Lingvo. Tiu jaro prezentos al ni unikan kaj idealan okazon por disvastigi informojn pri Esperanto, por atentigi la tutmondan publikon pri la utileco kaj potencialo de Esperanto, kaj por kune resumi kaj celebri jarcenton da sociaj kaj kulturaj atingoj de la genia kreaĵo de Zamenhof.

La planoj de Universala Esperanto-Asocio por la Jubilea Jaro bone antaŭeniras. Interalie, ni antaŭvidas aperigon de jubilea libroserio de verkoj reprezentaj por la Esperanta kulturo, kaj la manuskriptoj de la unuaj du volumoj jam estas pretaj. Ni planas sinsekvon de sciencaj konferencoj (la unua okazos en 1985), kulturajn festivalojn kaj aliajn tutkontinentajn aranĝojn en kaj ĉirkaŭ 1987 (unu – tiu en Jugoslavio – jam estas en plena preparo). Dum la Jubilea Jaro mem okazos spektakla dusemajna Universala Kongreso de Esperanto, plej verŝajne en Pollando (por kiu jam

formi patronan komitaton, ĝis la konsilo, kiel pledi por eldono de poŝtmarko honore al la Jubileo.

La kunordiga komitato por la Jubileo, kiu por komuna agado unuigis la grandegan plimulton de la ĉefaj Esperanto-organizaĵoj, laboras sub la prezidanteco de s-ro Grégoire Maertens, prezidanto de UEA. Ĝi jam havas sian sekretariaton, kiun gvidas s-ro André Staes en Belgio. Ĝia agado necesigas maksimuman streĉon de ĉiuj rimedoj – homaj kaj financaj – de la tuta Esperanto-movado. Pro tio, dum la ĵus okazinta Universala Kongreso de Esperanto, s-ro Maertens anoncis la starigon de INTERNACIA JUBILEA FONDAĴO, por financi la agadon por la Jubileo. Li alvokis ĉiujn parolantojn kaj simpatiantojn de la Internacia Lingvo kontribui per siaj donacoj al la realigo de la jubileaj planoj, ne nur de UEA sed ankaŭ de aliaj organizaĵoj, kiuj kunlaboras en la kunordiga komitato por la Centjara Jubileo.

Per tiu ĉi mesaĝo ni alvokas la tutan membraron de UEA, lokajn grupojn, landajn asociojn kaj aliajn



Miloj da esperantistoj kunvenis en la ĵusa Kongreso en Budapeŝto: Estas normale, ke la esperantistaro ariĝu por la Centjara Jubileo ĉirkaŭ UEA, kiel la ĉefa efektiviganto de la komuna jubilea programo.

venis formala invito, kaj pri kio UEA nun traktas kun Pola Esperanto-Asocio).

Kompreneble, la jubileaj planoj de UEA ne estas limigitaj nur al tiuj specifaj entreprenoj, kiujn la Asocio mem efektivigas. UEA kaj la aliaj movadaj organizaĵoj, kiuj komune formas la kunordigan komitaton por la Jubileo, evoluigas ampleksan serion da agadoj cele al kiel eble plej vasta informado pri Esperanto kaj pri la jarcento de ĝiaj atingoj. Tiurilate aperis speciala konsilaro pri la Jubileo – *Kiu faru kion?* (havebla de la CO en Roterdamo) – kun rekomendoj pri la farenda laboro je internacia, nacia kaj loka niveloj. Tiu konsilaro detaligas la jubilean laboron sur la plej diversaj agadkampoj, de la demando, kiel

grupiĝojn de esperantistoj, laŭ sia povo kontribui al la Internacia Jubilea Fondaĵo – por sekurigi la sukceson de la Jubileo, por igi tiun grandiozan eventon ŝlosila stadio en la tutmonda disvastigo de la Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto.

La Estraro de UEA:

Grégoire Maertens
Renato Corsetti
Barbara Despiney
Roland Lindblom
Baldur Ragnarsson
Flóra Szabó-Felső
Petăr Todorov
Humphrey Tonkin
Yosimi Umeda

Seminario pri publika parolado

La 1-a Internacia Virina Renkontiĝo okazis en Pisanica, Bulgario, sub aŭspicio de Bulgara Esperantista Asocio kaj UEA, de la 21a ĝis 26a de julio. Dudeko da virinoj el kvin landoj ĉeestis seminarion pri "Publika Parolado por Virinoj" ĉe la nova Internacia Esperanto-Kursejo (vd. revuon *Esperanto*, novembro, 1982).

Manko de antaŭa reklamado malhelpis atingon de granda konferenco, sed tiu malavantaĝo montriĝis absolute bonvena por tuja kreo de intima, bonhumora, kunlabora etoso. Anstataŭ kutimaj sinprezentoj por komenca interkonatiĝo, ni paroligis niajn kur-

sanojn per intervjuado: ĉiu persono devis intervjui sian najbaron, kaj poste prezenti ŝin al la grupo.

Por ke ili ne sentu sin kvazaŭ en speco de ferio, ni tuj donis hejmtaskojn por la sekvanta mateno: elekti temon el jam preta listo, kaj prepari kvin-minutan prelegon. Malgraŭ posttagmezaj ekskursoj, niaj avidaj studentoj tamen trovis temon por prepari sin.

Pro la granda sukceso de tiu laboro, kaj ĉar ili ŝajne ĝuis la sperton (kiu tute ne estis la intenco!), ni decidis asigni temojn por tri-minuta parolado. Sed ni zorge elektis temojn (ni ja sufiĉe bone interkonatiĝis) pri kiuj la koncernaj homoj ne interesiĝis. Estis tute amuze (niaj kursanoj estis ankaŭ spritaj), aŭskulti ekzemple virinon, kiu ne ŝatas kuiru, fari belan prelegon pri siaj plej ŝatataj receptoj, aŭ aŭskulti muzikiston rakonti pri neŝato de muziko! Sed la malfacila parto de tiu ekzerco estis la tri-minuta limo. Montriĝis, ke preskaŭ ĉiu preleganto uzis unu minuton por pardonpeti pro tempomanko, duan minuton por klarigi, ke ŝi tamen ne interesiĝas pri la temo... kaj fine, en la komenco de la lasta minuto, atingis la komencon de la prelego!

Aliaj similaj ekzercoj nur igis la kursanojn peti pli da laboro, kaj bedaŭri, ke ni ne havas pli da tempo.



Ingemund Bengtsson manpremas kun Chu Tunan (dekstre) dum rigardas Zhang Qicheng (meze) kaj Zhang Haiping, laboranto de ĈEL.

Debato organizita laŭ temoj, kun du teamoj (unu por, unu kontraŭ la koncerna temo), fariĝis iom mizera en la komenco. Ĝenerala amikeco kaj ĝentileco malhelpis niajn virinojn vere debati: je la unua provo, kiam unu persono kontraŭstaris alian, tiu simple konsentis anstataŭ defendi la pozicion, kiun ŝi devis preni. Tamen iom post iom oni kutimiĝis, kaj la debato fariĝis vigla. Sed la imagopovo de kelkaj teamoj malsukcesis kiam ili devis debati la temon, "Ĉu eduki denaskajn esperantistojn?". Plendis unu membro de la teamo kontraŭ la temo: "Sed mi ne scias kion diri, ĉar mi estas por tia edukado." Ĉu manko, aŭ ne? Tamen, bela fino al bela semajno. Ni konsentis, ke almenaŭ ĉiuj ni estas por pli de tiaj seminarioj.

Por tiuj, kiuj ankoraŭ ne havis eblecon sperti la belecon de Pisanica, necesas aldoni, ke la regiono mem de la kursejo, en la Montaro Rodopi en suda Bulgario, estas eksterordinara. Ĉiuj komentis ankaŭ pri la lukso de la ĉambroj (dulitaj, kun banĉambro) kaj la kursejo mem. La "noktoklubo", kiu troviĝas en la kelo de la konstruaĵo, ebligis al ni distrajn vesperojn kun dancado, trinkado kaj (dank' al la tute

Oficiala Renkontiĝo

En la julia-aŭgusta numero ni raportis pri la maja renkontiĝo inter la ĝenerala sekretario de UEA, d-ino Flóra Szabó-Felső, kaj la prezidanto de la Sveda Parlamento, s-ro Ingemund Bengtsson. Tiam s-ro Bengtsson esprimis sian deziron praktiki Esperanton kaj renkonti esperantistojn dum okazonta oficiala vizito al Ĉinio.

Sekve, meze de septembro, prezidanto Bengtsson renkontis en Pekino s-ron Chu Tunan, konstantan komitatano de la Ĉina Parlamento, prezidanton de "Amikoj de Esperanto" kaj vicprezidanton de la Ĉina Popola Asocio por Amikeco kun Eksterlando.

Honore al Ingemund Bengtsson, Chu Tunan aranĝis bankedon, kiun partoprenis i.a. s-ro Zhang Qicheng, ĝenerala sekretario de Ĉina Esperanto-Ligo, s-ro Ye Junjian (Cicio Mar), fama tradukisto kaj veterana esperantisto, s-ro Li Shijun (Laŭlum), redaktoro de *El popola Ĉinio*, kaj s-ro Zeng Heyao, ĝenerala sekretario de Pekina Esperanto-Asocio.

Ĉar temis pri renkontiĝo inter du el la plej altrangaj homoj en la hodiaŭa politika vivo, kiuj aktive apogas Esperanton, ne estas surprize, ke Bengtsson kaj Chu interparolis pri la neceso akiri subtenon de registaroj kaj internaciaj organizaĵoj, por plivastigi la uzon de la Internacia Lingvo. **gs**



Wera Dehler, kies deklama talento montriĝis en la Internacia Arta Vespero de la budapeŝta UK, kungvidis la seminarion pri publika parolado por virinoj.

hazarda ĉeesto de Veselin Damjanov kiel turisto ĉe la kursejo) foje kantado.

La gvidantoj de la seminario estis Belka Beleva (Bulgario), Wera Dehler (GDR), Anna Brennan (Italio) kaj Julie Tonkin (Usono).

Julie Tonkin, Usono

APLIKADO

Esperanto uzata samrange kiel du aliaj lingvoj

Kiel vi legis en la juna numero de nia revuo pasintjare, kibernetikistoj forte klopodas fari la Internacian Lingvon oficiala en sia fako. Tial oni kun granda intereso atendis la 10an Internacian Kongreson pri Kibernetiko, kiu okazis en Namur (Belgio) de la 23a ĝis la 28a de aŭgusto ĉi-jare. En tiu kongreso Esperanto estis samrange uzata kiel la angla kaj franca.

En la kongreso montriĝis, ke Internacia Asocio por Kibernetiko pro formalaj kialoj ne povis ŝanĝi

sian statutan difinon pri oficiala lingvo. Oni tamen konstatis, ke laŭstatute nur la franca estas la oficiala lingvo de la asocio, kvankam la anglan ĝi uzis ekde sia komenco, same kiel Esperanton ekde 1980. Tiun staton oni konservos almenaŭ ĝis eventuala ŝanĝo al la statuto, plej frue en 1984.

Estas interese noti, ke ĉiuj ĉefpledantoj por la uzado de Esperanto, prof. d-ro Helmar Frank (FR Germanio), prof. d-ro Fabrizio Pennacchietti (Italio) kaj prof. d-ro Oswaldo Sangiorgi (Brazilo), estis unu- anime reelektitaj al la estraro de Internacia Asocio por Kibernetiko.

Ĉar Internacia Asocio por Kibernetiko estas speciale ligita al la provinco Namur kaj tie devas okazigi siajn kongresojn, sed favoras la ideon, okazigi du jarojn post ĉiu kongreso en Belgio kongreson ekster Namur, oni decidis fondi novan organizaĵon, nekonkurencon al la jam ekzistanta, por tion povi plenumi. Tiu fondata organizaĵo provizore nomiĝas Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko, kaj jam akiris 43 membrojn el 19 landoj. Ĉi tiu organizaĵo okazigos sian unuan membrokunvenon en San-Marino inter la 27a de decembro ĉi-jare kaj la 7a de januaro 1984. Tie oni decidis pri la statuto kaj estraro. Oni substrekas, ke la nova organizaĵo celu apogi kaj reprezenti la jam ekzistantan ekster Belgio kaj precipe en landoj, kie oni parolas nek la francan nek la anglan. Pliaj informoj estas riceveblaj de Instituto pri Kibernetiko, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

FAKA AGADO

Planoj por restrukturi ISAE

Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) ekfunkciis jam en 1906, kvankam ĝi fondiĝis nur en 1908. Tuj ĝi fariĝis unu el la plej prestiĝaj fakaj asocioj, ĉar aliĝis multaj membroj el naciaj sciencaj akademioj kaj aliaj famuloj. (Tre interesa superrigardo de la unuaj 50 jaroj aperis en *Sciencaj studoj*, Kopenhago 1958.) Tamen post la krizo ŝuldata al la Dua Mondmilito kaj pro la pli kaj pli specialiĝanta mondo, la scienc-fakan agadon oni strebis organizi en diversaj asocioj kaj ne plu en unu.

Nuntempe ISAE alvenas al punkto, kie ĝi fiaskus, se ĝi plu emus fariĝi memcela, neglektante sian veran kunordigan celon, kiun mi nun pli precizigu. En la faka agado partoprenas multaj diversaj asocioj, sed ili bedaŭrinde malmulte kunlaboras inter si kaj daŭre

foruzas sian energion je la samaj taskoj pro manko de interinformiteco, dum restas multegaj problemoj, pri kiuj ni ne havas tempon eĉ pensi.

Dum la 68a UK en Budapeŝto, precipe en la kunveno de ISAE sed ankaŭ en aliaj kunsidoj, evidentiĝis, ke ISAE devus transpreni tiun interligan taskon, eldonante informbultenon: "ISAE informas". Ĝin oni aŭtomate sendus al ĉiuj membroj de la diversaj scienc-fakaj asocioj, diskonigante informojn pri la asocioj mem, pri iliaj planoj, atingoj, renkontiĝoj ktp. Ĝi nepre devus anonci frue ĉiujn fakajn aranĝojn kaj helpi al ilia realigo, interalie per varbado de partoprenantoj. Unuvorte, ISAE devus esti la tegmenta, kunordiga centro de la scienc-faka agado. Ĝian praktikan formon mi prezentu jene:

1. ISAE nepre estu jure registrita asocio por ebligi ĝian oficialan agadon en ĉiuj landoj. (Ĝi eĉ devus fariĝi integra parto de UEA, ĝia scienc-faka sekcio, kun statuso simila al tiu de la junulara sekcio, TEJO.)
2. Ĉiu membro de kiu ajn scienc-faka asocio estu aŭtomate membro de ISAE.
3. Fakuloj el branĉoj, kiuj ankoraŭ ne havas propran sekcion, aliĝu rekte al ISAE. Kiam ili estos sufiĉe multnombraj kaj fortaj, ili fondu propran fakan asocion.
4. ISAE eldonu laŭeble plej ofte, en la komenco almenaŭ kvarfoje jare, bultenon "ISAE informas" kaj distribuu ĝin rapide, ĉu rekte, ĉu pere de la fakaj asocioj, al la fakuloj tra la mondo.
5. La financaj rimedoj venu kaj de la fakaj asocioj, kiuj pagu iun proporcian sumon por siaj membroj, kaj de la rektaj membroj, kiuj pagu individue. Memkompreneble estu eble aboni al "ISAE informas" sen aliĝi al iu ajn asocio.
6. La rektaj membroj de ISAE plue eldonu la fakan periodaĵon *Scienca revuo*.
7. En kunlaboro kun Scienca Eldona Centro (SEC) de UEA, ISAE subtenu eldonadon de scienc-fakaj verkoj kaj kunordigu kompiladon de "Scienca bibliografio Esperanta".
8. En kunlaboro kun la Terminologia Sekcio de SEC, ISAE kunorganizu la terminologian laboron kaj la diskonigon de fakaj terminaroj; la fina celo de tio estu eldono de "Plena scienc-teknika vortaro de Esperanto".
9. Alia tre grava tasko de ISAE estu helpi al la kunordigado kaj organizado de scienc-fakaj konferencoj, seminarioj ktp. Precipe temas pri varbado de aliĝantoj kaj pri senmona interŝanĝo de partoprenantoj inter ekonomisistemoj.

Temas fakte pri pli ol restrukturiĝo de ISAE, pri starigo de novstila kunordiga organizo de la faka agado, kiu transprenos la jam prestiĝan nomon, ISAE. Ni memkompreneble devus redakti novan statuton kaj organizi novan komitaton/estraron. Tamen en la unua etapo, provcela, ni certe povus ekfunkciigi

la novan ISAE sur la malnovaj bazoj sensânge, almenaŭ ĝis eblos kunvoki ĝeneralan asembleon de fakaj asocioj.

Ni tre forte esperas, ke ĉiuj fakaj asocioj kaj UEA kunhelpos al la transformiĝo de ISAE al formo, kiun postulas la Esperanta faka agado en nia moderna mondo. Nur kune eblas efike alfronti la centjariĝon de Esperanto.

Christian Darbellay,
ĝenerala sekretario de ISAE

AFRIKO

Kursosvarmo en Zairio

La plej forta landa Esperanto-movado en Afriko estas tiu de Zairio. El la Jarlibro oni povas informiĝi, ke Esperanto-Instituto de Zairio havas 25 membrojn. Ĝi estas unu el la du aliĝintaj landaj asocioj de UEA en tiu vasta kontinento. Se oni pensas pri la kondiĉoj en Afriko, tio estas jam konsiderinda atingo. Kvantkam la zairia Movado ankoraŭ estas en ĝerma stadio, diversloke en la lando okazas serioza agado por la Internacia Lingvo.

Kadre de la Regiona Agado de UEA, oni petis en 1981 s-ron K. Braet esti la eŭropa kontaktulo por la zairia Movado. S-ro Braet estas kunfondinto de la iama Konga Esperanto-Instituto (la nuna Esperanto-Instituto de Zairio) kaj dum sia restado en la lando li multe instruis kaj helpis establi la komencon de loka Esperanto-movado. En tiu jaro – 1981 – la agado tamen jam stagnis. Plurloke estis izolitaj esperantistoj, nenio pli.



Ŝlosilan rolon en la zairia agado ludas s-ro Nduantoni-Bakidila Ngangu.

Nenia landa agado estas ebla sen sindona laboro de homoj en la lando mem. Lernejestro, s-ro Nduantoni-Bakidila Ngangu, fariĝis la loka respondeculo por EIZ, kaj en la Universala Kongreso en Brazilio la estraro de UEA decidis doni malgrandan subvencion por helpi la enlandan Movadon. Krome kelkaj bonvolaj esperantistoj i.a. el Nederlando kaj Britio mondonacis al speciala konto ĉe UEA, aparte por helpi alsendon de lernolibroj kaj vortaroj. El Fondaĵo

Azio-Afriko oni financis alsendon de informaj broŝuroj en la franca. Oni krome interkonsentis regule ekspedi la franclingvajn revuojn *L'espéranto en marche* kaj *Espéranto actualités* senpage, kiel ankaŭ lastatempe korespondajn kursojn.

Estas jam kvar delegitoj de UEA en Zairio. Krom s-ro Ngangu, la delegito kaj fakdelegito pri instruado en Lukala, s-ro Ahmed Selana Tshibas, studento ĉe supera pedagogia instituto, estas la delegito en Bukavu. En Kinŝaso, la ĉefurbo, estas du fakdelegitoj: s-ro Mfumi Ndongola Nsimba, junulargvidanto, kaj s-ro Malonga Matuba Ngingi, radio-redaktoro. El tio oni rajtas konkludi, ke almenaŭ parto de la ĝisnuna, relativa sukceso ekestabli Esperanton en Zairio ŝuldiĝas al tio, ke pluraj el la landaj aktivuloj havas publike influan profesion.

En Lukala la Esperanto-klubo estas sub la gvido de s-ro Ngangu. La klubon li fondis, kiam 11 kursanoj sukcese plenumis duagradan ekzamenon. Okaze de la kursofino, s-ro Ngangu prelegis antaŭ multnombra publiko pri Esperanto kaj disdonis atestilojn. La elementan kurson en Lukala nun gvidas 19-jara s-ro Tufuene Mafuila. En ĝi lernas 14 gejunuloj. La adreso de la klubo estas: ĉe s-ro Ngangu, B.P. 13, Lukala, Nkandu, Zairio.

Indiko pri la aktiva intereso jam kreita en Zairio venas el letero de s-ro Ngangu, en kiu li skribis, ke li pro invita letero veturis al la urbo Luozi, 180 kilometrojn de Lukala, kie oni petis lin organizi kurson.

Dek du kilometrojn for de Lukala, okazas elementa kurso en Kimpese sub la gvido de 22-jara s-ro Mafuila Nlandu, en kiu lernas 11 gejunuloj. Adreso: Esperanto-Klubo "La Espero", ĉe s-ro Nlandu, Ave. Kikenga 9, Quartier 4 – IME, Kimpese, Zairio.

En Kuilu-Ngongo instruas 27-jara s-ro Mavomo Mafuila-Tunga al dek gekursanoj (Esperanto-Klubo, ĉe s-ro Mafuila, Compagnie Sucrière, B.P. 122, Kuilu-Ngongo, Zairio).

De post septembro funkcias elementa kurso de Esperanto ankaŭ en Kinŝaso sub la gvido de s-ro Toko.

Krom la kursoj, estas pluraj interesitoj kiuj lernas per la koresponda kurso de UFE.

Tiuj, kiuj ŝatus subvencii la administran laboron de EIZ, povas sendi kontribuon rekte al la CO de UEA en Roterdamo, kun la mencio: por Zairio (UEA-kodo eizk-1). Alie, por lernolibroj, vortaroj, informiloj ks., eblas donaci al Fondaĵo Azio-Afriko ĉe UEA. Tiuj kiuj deziras persone sendi lernomaterialon, bonvolu unue kontakti la komisiiton de UEA, s-ron K. Braet, 1 rue des Palmiers, F-66270 Le Soler, Francio. Vi povus helpi ankaŭ al kreo de biblioteko ĉe ekzistanta klubo, sendante rekte libron en Esperanto aŭ informilojn ks. en la franca. La komisiito volonte konsilos al kluboj, kiuj ŝatus krei konstantan rilaton kun grupo en Zairio.

Nova branĉo: Kanto

Kanto ekfunkcios kiel nova branĉo en la Belartaj Konkursoj de UEA ekde 1984. Ĝia iniciatinto estas s-ro Ahn Song-san el Seulo, Korea Respubliko, kiu donacis monsumon, per kies rento premiĝos ĉiujare unu verko. La nova premio nomiĝas "Premio An-okin Korea pri Kanto". La sekvantaj kondiĉoj validas por tiu ĉi branĉo:

1. Teksto kaj melodio devas ambaŭ esti novaj kaj ankoraŭ ne publikigitaj;
2. Teksto kaj melodio povas esti verkitaj de malsamaj aŭtoroj;
3. Teksto kaj muziknotoj estu senditaj en po 4 ekzempleroj al la sekretario de la Belartaj Konkursoj kaj devas lin atingi plej malfrue la 31an de marto en la konkursa jaro;
4. La kanto premiita estu publike prezentita de kantisto aŭ ĥoro se eble en la koncerna UK, kaj en kazo de neeblo, en la postjara UK;
5. La premiitaj kantoj estu ankaŭ laŭeble presitaj tekste kaj muziknote en iu formo.

Ĉi tiu nova branĉo estas la kvara aldonaĵo al la Belartaj Konkursoj dum la lastaj kelkaj jaroj. La ceteraj estas la fotografia branĉo, la eseo por Premio Luigi Minnaja kaj la Infanlibro de la Jaro.

La tradiciaj branĉoj

La tradiciaj branĉoj: poezio, prozo kaj teatraĵo daŭre konsistigas la kernon de la Konkursoj. Pri ĉi tiuj tamen estas aparta kaŭzo nun atentigi, ĉar komencas sentiĝi ia tendenco al laciĝo aŭ neglekto pri ili dum la lastaj du aŭ tri jaroj. La nivelo de la konkursaĵoj konstateble iom falis, envenis pli da tekstoj, kiuj ne kontentigis minimumajn postulojn farendajn al konkursojaj tekstoj. Mi devas instigi ĉiujn novajn

partoprenontojn en la Konkursoj serioze konsideri la kondiĉajn faktojn rilate al inda konkursado. Ne havas multan sencon ensendi siajn unuajn provojn, eble faritajn post nur kelkmonata lernado de la lingvo. Oni nepre konsideru la Konkursojn indaj je kritikema sinteno koncerne akcepteblan prezenton lingvan kaj enhavan. Mi konsilas al ĉiu nova konkurso submeti siajn produktaĵojn unue al prijuĝo de almenaŭ unu sperta esperantisto, kiu bone konas ne nur la lingvon, sed ankaŭ ĝiajn literaturajn tradiciojn, kaj profiti el ties konsiloj.

La Belartaj Konkursoj jam dum 33 jaroj servis kiel valora instigilo por nia vivanta literaturo. Por ke ili daŭre restu tio, ni devas respekti ilian tradician rolon kaj klopodi laŭeble alte teni la kriteriojn, kiuj devas tie validi. Mi esperas, ke dum la nova trijara konkursperiodo ni spertos vere kontentigan progreson en ĉiuj konkursaj branĉoj; aparte mi ŝatus bonvenigi novajn talentojn en la tradiciaj branĉoj de poezio kaj prozo.

Konkursaj detaloj por 1984

Rajtas konkursi ĉiu esperantisto, kiu ne gajnis dum la tri tuj antaŭaj jaroj unuan premion en la branĉo por kiu ŝi aŭ li konkuras. Unu persono povas partopreni per maksimume 3 verkoj en ĉiu literatura branĉo.

Poezio: Sen fiksita maksimuma longo de konkursaĵo. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo de konkursaĵo 200×65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma ludodaŭro 25 minutoj. Tri premioj.

Eseo: Temo lingva, literatura, historia aŭ sociologia prefere en ligo kun la Internacia Lingvo. Longo ĉ. 400×65 tajpospacoj. Unu premio (Premio Luigi Minnaja).

Infanlibro de la Jaro: Oni rajtas proponi ĉiujn infanlibrojn kiuj aperis dum la jaro 1983, originalajn kaj tradukitajn. Unu premio.



Fotografio: Minimuma formato 13×18cm. Fotoj povas esti nigrablankaj aŭ koloraj. Tri premioj.

Kanto: Vidu supre.

La konkursaĵoj en branĉoj poezia, proza, teatraĵa kaj kanta devas esti senditaj en 4 ekzempleroj al la adreso de la sekretario de la Konkursoj: s-ro Alec Venture, 22A Grosvenor Road, Wallington, Surrey, Britio SM6 0EF, kaj devas atingi lin plej malfrue la 31an de marto 1984. Por la branĉo "Infanlibro de la Jaro" oni sendu 3 ekzemplerojn de la koncerna libro al la adreso de la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, same ĝis la 31a de marto 1984. En la branĉo "Fotografio" sufiĉas sendi unu ekzempleron de ĉiu konkursaĵo al: Loka Kongresa Komitato de la 69a UK de Esperanto, 53 North Boundary, Vancouver, BC, Kanado V5K 3S4, tiel ke la sendaĵo atingu tiun adreson antaŭ la 1-a de julio 1984.

La konkursaĵoj (escepte de la infanlibroj) devas esti signitaj per pseŭdonimo; en aparta koverto estu indiko de tiu pseŭdonimo kun nomo kaj adreso de la konkursanto. Se tion permesas la poŝtaj reguloj de la koncerna lando, oni aldonu po 5 ĝuste stampitajn internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo en kiu oni konkuras. Sur ĉiuj konkursaĵoj estu klare indikita la konkursa branĉo.

Baldur Ragnarsson,
prezidanto de la Belartaj Konkursoj

LINGVO

Preferi ol aŭ preferi al

Dum la publika kunveno de la Akademio de Esperanto en la budapeŝta Universala Kongreso, unu el la gramatikaj demandoj prezentitaj de ĉeestantoj temis pri la uzo de la konjunkcio *ol* kaj la prepozicio *al* post la verbo *preferi*. Ĉar mia tiutempa respondo, sen apogo de notoj kaj citaĵoj, ne estis tute adekvata, mi dezirus nun detale pritrakti la lingvouzon. Trakribado de esperantlingvaj konsultlibroj montras, ke okazis ŝanĝoj, kiuj speguliĝas en la sekvaj ekzemploj.

Plena vortaro, 1934:

- 1) preferi morti ol senhonorigi
- 2) preferi supon ol viandon, poezion ol prozon
- 3) tion mi preferas al la manĝoj el kuirejoj de la plej bona hotelo^Z
- 4) vi prenu la aŭtomobilon prefere ol la kaleŝon.

Rimarku, ke *ol* estas uzata preskaŭ ekskluzive, senkonsidere, ĉu estas kunligitaj du infinitivoj aŭ du substantivoj. La sola escepto estas la zamenhofa frazo, numero 3, en kiu la prepozicio *al* montras la

rilaton inter la pronomo *tion* kaj la substantivo *manĝoj*. Tridek ses jarojn poste kelkaj el tiuj frazoj aperis en modifita formo.

Plena ilustrita vortaro (PIV), 1970:

- 1) preferi morti ol senhonorigi
- 2) preferi fiŝon al viando, poezion al prozo
- 3) tion mi preferas al la manĝoj ... de la plej bona hotelo^Z
- 4) uzu aviadilon prefere al ŝipo
- 5) prefere neniigi nian domon per fajro, ol permesi, ke ili mizere pereu^Z

La evidenta ŝanĝo estas la uzo de la prepozicio *al*, kiam temas pri substantivoj, plej probable por imiti la zamenhofan uzon de la tria frazo. Rimarku ankaŭ, ke en la kvina citaĵo el *PIV*, kiu same estas de Zamenhof, la konjunkcio *ol* estas uzata kun la adverba formo *prefere* por kunligi du infinitivojn.

La pli frua *Vortaro de Esperanto* de Kabe (1922) enhavas nur "preferi supon ol viandon; preferi poezion ol prozon", do supozeble en la plej frua tempo *ol* estis uzata multe pli ofte ol *al*. En etnolingvaj Esperanto-vortaroj troviĝas ekzemploj jen kun *ol*, jen kun *al*. G. Waringhien en sia *Grand dictionnaire espéranto-français* (1957) registras nur unu formon: *prefere al*. En *Dictionnaire français-espéranto* (1961) de Léger kaj Albault, la franca verbo *préférer à* estas tradukita per *preferi ol*. Hezito montriĝas en *Esperanto-bulgara vortaro* (1963) de Sarafov kaj aliaj: *preferi akvon ol (al) vino*. La ekskluziva uzo de *ol* aperas en *Esperanto-English Dictionary* (1967) de M.C. Butler: *preferi morti, ol perfidi; preferi akvon ol vinon; trinku lakton prefere ol bieron*.

En la paragrafo 210.4 de *Plena analiza gramatiko* (1980) estas pritrakitaj koncern-adjektoj, kompare al kiuj oni esprimas diferencon. Se komparacia vorto, ekzemple *preferi*, indikas la diferencon, oni povas enkonduki tiujn adjektojn per *kontraŭ* aŭ *al*:

- 1) ili vivas sub regado, kontraŭ kiu ili preferus la turkan^Z
- 2) preferi ion al io

Aliloke en la sama verko (179.2) estas klarigite, ke la dativa objekto (*al*-objekto) estas la objekto de ricevanteco kaj troviĝas ĉe du- kaj tridirektaj verboj. Inter tiuj verboj estas *preferi*. Pro tio, kiam temas pri du substantivoj post *preferi*, la rekta objekto estas en la akuzativa kazo, kaj sekvas ĝin dativa konstruo, konsistanta el la prepozicio *al* kaj la dua substantivo, ekz. *Mi preferas rizon al pano*.

Ĉe la fino de la artikolo pri *preferi* en *PIV* troviĝas rimarko, kiu servas kiel regulo por la uzo de *al* kaj *ol* post *preferi*: "Kiel oni vidas, oni post *preferi* uzas *al* antaŭ substantivo kaj *ol* antaŭ infinitivo." Per tiu ĉi nuntempa uzo, oni povas eviti la demandon, kelkfoje faritan, pri la kazo post *ol* – ĉu nominativo aŭ akuzativo.

Bernard Golden

Ampleksa pritrakto en multaj prelegoj, konferenco kaj debato

Verŝajne neniam ĝis nun okazis tiel ampleksa pritrakto de la kongresa temo, kiel oni spertis en Budapeŝto. La temo "Sociaj kaj lingvaj aspektoj de la moderna komunikado" estis traktita ne nur en la inaŭgura parolado kaj la Dua Ĝenerala Kunsido (kiel tradicie), sed ankaŭ en tuta aro da prelegoj kaj debatoj, kaj en aparta konferenco, kies laboron skizas d-ro Maitzen en la ĉi-suba teksto. Al la temo ligiĝis ankaŭ aparta ekspozicio en la kongresejo. Kvankam oni unuflanke povus plendi, ke tia ambicia kongrestema traktado forprenas la atenton de la aktualaj movadaj demandoj pri kiuj la Kongreso devus okupiĝi, ĉi-foje la temo estis preskaŭ movada kaj valoris klopodi, ke kiel eble plej multaj esperantistoj vaste informiĝu pri kiel eble plej diversaj aspektoj de la komunikado.

Meze de aprilo 1983 aperis flugfolio kiu anoncis la okazigon de tiu konferenco, kies nomo diveneble konstruiĝis el *Komunikado-Esperanto-Konferenco*, kvankam nenie aperis klarigo pri tio. En tiu cirkulero oni anoncis ke "la ĉi-jara UK traktos en apartaj sekcioj la rilatojn inter la teknikaj, sociaj kaj lingvaj aspektoj de la komunikado". Oni atentigis, ke dum tiu konferenco ne nur la Internacia Lingvo, sed ankaŭ la franca, hungara, rusa kaj angla lingvoj estos allasitaj kaj, ke oni zorgos pri samtempa interpretado. Post tio sekvis propono de la strukturo de la sekcioj – entute oni antaŭvidis sep tiajn – en kiu kadriĝu la ege vasta temaro ligita al la nocio *komunikado*.

Post tiu aŭdaca anonco estas inde demandi, kia realo sekvis el ĝi en la kadro de la 68a UK en Budapeŝto. Unue estas rekoninda la fakto, ke la alvokon prelegi en tiu konferenco sekvis trideko da fakuloj, inter ili kvarono neesperantistoj kaj samtempe hungaroj. Tio plifaciligis la samtempan tradukadon ege, ĉar nur du lingvoj uziĝis, Esperanto kaj la hungara. Al la neprofesiaj interpretantoj atribuiĝu laŭdo pro ilia bona plenumo sub malfacilaj cirkonstancoj.

Krom tio, la salono Baghy estis sufiĉe taŭga laŭ sia grandeco, kiu permesis partoprenon de proksimume 100 personoj. Pro ne tute klara kialo la dua el entute kvar sesioj okazis en la salono Zamenhof, kiu donis lokon por 5 000 homoj, sed kie dum la koncerna sesio la aperintaj 70 interesitoj preskaŭ tute perdiĝis en la



Isajev: La lingvaj aspektoj de komunikado.



Frank: Lingvo-orientiga instruado stimulas lernefikon.

vakuo, des pli malagrabla, ĉar en tiu sesio aperis neesperantistaj fakaj eminentuloj hungaraj.

Manko de interesiĝo flanke de la kongresanaro rezultis de tio, ke oni ne prezentis la programon de KOMESKON kune kun la parolontoj kaj la resumoj de ties prelegoj en la Kongresa Libro. Male, oni devis iom pene serĉi la programfolieton tripaĝan, kiu ne haveblis en anoncita "ĝiĉeto", sed kiu preskaŭ perdiĝis en la stando de la komputilistoj. Estas bedaŭrinda tragikomedio, ke ĝuste komunikada konferenco suferis pro esenca manko de informado. Aro da homoj argumentis, ke la plej bona solvo estus enkadrigo de tiu konferenco en Internacia Kongresa Universitato, kiu ja dece anonciĝis en la Kongresa Libro. Kompreneble tiuokaze la preparlaboroj devus komenciĝi jam multe pli frue.

La demando nun estas, ĉu io bona kaj fruktodona tamen rezultis el la okazigo de tiu konferenco, kiu evidente estis nur duonamata filo inter la aliaj programejoj de la 68a UK.

Unue oni devas mencii la inaŭguran prelegon de Richard E. Butler (vidu aliloke en ĉi tiu revunumero), kiun do ĉeestis preskaŭ ses mil aŭskultantoj. La prelego de s-ro Butler enhavis (iom diplomate implice) gravan rekonon kaj alvokon al la esperantistaro, kiun li (ĉu flate?) ĝenerale nomis "ekspertoj" pri la "utilo kaj la teknikaj aspektoj de la uzado de Esperanto en la hodiaŭa mondo, kio implicas uzadon ankaŭ en la mondo de modernaj telekomunikado kaj komputiloj". Tiu prelego donis idealan diskutbazon por KOMESKON.

Evidentas ja, ke la Monda Komunika Jaro 1983, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj, kaj subtenata i.a. ankaŭ de UEA per aro da agadaroj, al kiu apartenas la okazigo de KOMESKON, ne kovras la tutvastan aspekton de komunikado, sed ĉefe tiun de la teknika flanko de komunikado, la disvastigon de la uzado de la modernaj, elektronikaj rimedoj por superkovri nian



**Sherwood: Survoje al neli-
migita voĉsintezado.**

**Maitzen: La hom-maŝina
dialogo jam 500-jara?**



planedon per densa reto de telekomunikaj instrumentoj. Pro tio, grava korektilo estis la dua inaŭgura prelego de la vicprezidanto de UEA, prof. H. Tonkin, kiu insistis pri tio, ke instrumento sola nenion valoras, kaj ke necesas havi la homojn pretaj kaj kapablaj al komunikado, kio implicas ankaŭ la demandon pri la lingvoj, kiujn ili uzas aŭ povas uzi por la interkomunikado.

Ja estas tasko de ni, kiel esperantistoj, atentigi pri la lingva aspekto de la komunikado kaj pri la etiko de la komunikado mem, kiun tre impresis dum la tria sesio de la konferenco eksponis H. Welger (li parolis pri la komunikada etiko de la esperantismo, kiu baze estas etiko kiun povus akcepti ĉiuj homoj sendepende de siaj mondpercepta, ideologia kaj religia anecoj). Aliflanke ni devas akcepti, ke la akcento en tiu Monda Komunikado Jaro estas sur la "hom-maŝina" dialogo. Kaj tion ni ne malalte taksu, kiel klarigis dum la Dua Ĝenerala Kunveno de UEA pri la kongresa temo H.M. Maitzen, ĉar la hom-maŝina dialogo kaj teknika flanko de komunikado jam esence komenciĝis antaŭ duonmilo da jaroj kun la invento de la presado, kiu havis grandegan efikon al la plua historio de la homaro, pro la subite plimultiĝinta haveblo de informoj por vastaj popolamasoj, kio finfine kondukis al la estiĝo de la koncepto pri demokrataj ŝtatoj kaj konstitucioj en Eŭropo kaj poste en la tuta mondo.

Kaj fine, nia Internacia Lingvo tute ne estas maltaŭga por la menciita hom-maŝina dialogo, eĉ male, kvankam ne konstruita de komputilisto-lingvisto, ĝia reguleco tre proksimigas homon kaj maŝinon. Tio rilatas la problemon de aŭtomata traduko, por kio A.P.M. Witkam eksponis la uzon de Esperanto kiel pontlingvo, projekto nuntempe studata de li en granda nederlanda sistemevoluiga entrepreno. Sed ĝi ankaŭ koncernas la prilaboron de homa voĉo fare de komputiloj, kiu dividiĝas en la taskojn de aŭtomata parolpercepto kaj voĉsintezo. La unua estas studata

nuntempe de franca grupo sub la gvido de d-rino M.T. Mas-Giorgetti, kiu bedaŭrinde ne ĉeestis la konferencon kaj kies laboro estas ankoraŭ tro malmulte konata en la esperantistaj medioj. Ŝian laboron kaj la rilatan esplorproblemon elmontris H.M. Maitzen en la dua sesio.

Pri la voĉsintezo, kiu estas pli facila tasko ol la rekono de parolata lingvo, ne rekte prelegis B.A. Sherwood, la konata fakulo kaj akademiano, sed li liveris diskutkontribuon post la prelego de G. Gordos de la Budapeŝta Politeknika Universitato (ne-esperantisto) pri "Lingvosendependa voĉsintezo". Tiu metodo baziĝas sur stokigo de nature parolataj lingvospecimenoj, kies elementojn (vortojn, silabojn) oni numeras kaj poste laŭbezone rekunmetas. Esperantlingvajn specimenojn prezentis la preleginto per sia sintezilo kunportita. Sherwood kontraste al tio akcentis, ke jen ne temas pri vera sintezado, do generado de fonemoj per la komputilo en la laboro de G. Gordos, sed pri registrado kaj rekunmetado, dum li mem prilaboras la nelimigitan voĉsintezadon.

Entute, la kombino de la tri esplorkampoj: aŭtomata lingvorekono, aŭtomata traduko kaj voĉsintezo, se iam sukcese evoluigitaj, povus atribui al la Internacia Lingvo grandegan prestiĝon kaj internacian rekonon, ĝuste pro la argumentado, kiun s-ro Butler eksponis en sia rimarkinda parolado.

Alia enhava sekcio (ne estis organizaj sekcioj, kiel oni antaŭanancis en la cirkulero pri la okazigo de KOMESKON) rilatis la aplikadon de komunikada teknologio en diversaj hungaraj institucioj, pri kiu nature raportis hungaraj teknikistoj kaj fakuloj, inter ili plej elstare F. Valter, ĝenerala vicdirektoro de la hungara Poŝto, kiu ankaŭ prezidis sesion de la konferenco. Grava neesperantista kontribuinto estis la ĝenerala sekretario de la hungara Asocio pri Unuiĝintaj Nacioj, s-ro E. Gömbös, kiu prelegis pri la "Inter-

nacia datumcirkulado". Pri la jura kaj sociologia flankoj de la kongresa temo prelegis la direktoro de la Amaskomunikada Esplor-Centro de Hungara Radio kaj Televido, s-ro T. Szecskö: "La nova internacia informa kaj komunika ordo, pretendoj kaj realo". Kiel oni jam vidas el la titolo, temis pri la diverĝo inter la postulo al plena egaleco kaj la tavolo de la socio kaŭze de la komunikadaj strukturoj.

La tri laste menciitaj prelegoj okazis dum la dua kunsido, sub la prezido de R. Corsetti, kiu tamen ne permesis diskuton post la unuopaj prelegoj, pro la tempo-premo, situacio, kiu estas netipa por scienca konferenco.

Vigla diskuto okazis en la unua sesio (prezidis: H.M. Maitzen), en kiu unue parolis M.I. Isajev pri "La lingvaj aspektoj de la komunikado" (eksponente la aktualan kulturpolitikon de Sovetunio) kaj due s-ro J. Galambos pri la "Evoluigo de la tradiciaj kaj novaj metodoj de sciencoteknika informado en Hungario ĉe la Tutlanda Teknika Centro kaj Biblioteko" (hungare). Simile estis post la tria kontribuaĵo (prof. L. Deme pri "Estonteco de lingvoj – la lingvo de estonteco") kaj precipe post la prelego de prof. H. Frank ("La rolo de ILO en la transpontigo de la lingvaj baroj de internacia komunikado"), kiu raportis i.a. pri la rezultoj de la t.n. "lingvo-orientiga instruado" en bazaj lernejoj, kiuj klare montras, ke instruado de baza scio de Esperanto antaŭ ĉiu alia fremdlingvo kreskigas la postan lernefikon ĉe la dua fremdlingvo. Tamen eble plej interesveka estis lia raporto pri la baldaŭa inaŭguro de Internacia Akademio de Sciencoj en la Respubliko San Marino, kiu uzos ankaŭ la Internacian Lingvon kaj kiu eventuale donos la eblecon doktoriĝi uzante tiun lingvon.

Fine, ni menciis la paroladon de B.A. Sherwood pri la misa situacio de la komunikado dum internaciaj sciencaj konferencoj kaj simpozioj, en kiu li elstarigis kaj la problemojn ligitajn al la uzo de nur unu nacia lingvo kondukanta al diskriminacio de la negepatralingvanoj, kaj aliflanke la misaĵojn rezulte de la interpretado.

Resume, oni certe povas agnoski, ke KOMESKON alportis al la (bedaŭrinde malmultaj) partoprenantoj valorajn novajn informojn kaj aspektojn pri la komunikada problemo ĝenerale kaj pli precize pri la aktuala enplektiĝo de scienca laboro pri Esperanto en tiu kunteksto. Vide al la alvoko de la ĝenerala sekretario de ITU, tiu konferenco ne restu la sola, sed ĝi estu komenco de pli intensa scienca esplorado pri la temo Esperanto kaj la hom-maŝina dialogo. Pli zorga planado kaj preparado de estontaj aranĝoj similtipaj devus ankaŭ garantii la popularigon de la sciencaj problemoj al pli vastaj amaĵoj de la esperantistaro, tiel ke la Butler-a "vi estas la ekspertoj" almenaŭ grandparte praviĝu.

H.M. Maitzen

TEATRO


Festivalo ene de la Kongreso

Kiam oni dum kvin tagoj havas la eblecon vidi dek unu teatraĵojn, tio ne sonas kiel kongresa sed kiel teatra semajno. Dum la 68a UK estis ĝuste tiel. Tamen ne por ĉiuj kongresanoj, ĉar el kvin mil homoj tie nur proksimume tri mil spektis almenaŭ unu el la teatraĵoj. Tio ja signifas, ke maksimume duono de la kongresanoj gustumis la teatran arton en Budapeŝto, ĉar multaj kongresanoj provis vidi ĉiujn aŭ almenaŭ la plimulton de la spektakloj. Helpe de kelkaj kunlaborantoj ni provos ĉi-sekve resumi tiun mamutan teatran repertuaron de la kongresa semajno.

Tre sukcesa prezento de malfacila verko

En Esperanto jam ekzistas tuta tradicio de Ŝekspir-tradukoj, al kiu William Auld estas aktuala kontribuanto. En tia tradukado gravas ne nur beletra kvalito sed ankaŭ praktikaj rezultoj. Foje, belaj dramaj tradukoj tamen montriĝas pene ludeblaj. La surscenejigo de *Epifanio* en Budapeŝto prezentis bonan okazon por elprovi la praktikan kvaliton de tiu ĉi traduko de Auld.

Laŭ ĉiuj kriterioj la teksto brile redonis la ŝekspiran etoson. Auld lerte konservis la abundajn vortludojn kaj rapidajn intertraktojn de la originalo, kaj ili montriĝis



Supre: La surscenigo de la ŝekspira komedio Epifanio. D. rolas en la propra monodramo Zamenhof.

plene taŭgaj por la scenejo. La realigo flanke de Bulgara Esperanto-Teatro – kiu ĵus festis sian 25-jaran jubileon – bone respondis al la vervo kaj elano entenataj en la originalo kaj ties traduko, kaj la tuta prezento antaŭeniris kun admirinda impeto.

Kvankam *Epifanio* estas inter la plej lerte organizitaj komedioj de Ŝekspiro, ĝi ne estas tute senproblema – precipe pro la karaktero de Malvoljo, la senhumura intendanto kies trompiĝo formas la centran intrigon, kaj kies iom senkompata persekutiĝo tro facile povas kapti la simpatian de la spektantoj, tiel malekvilibrigante la finan scenon. Kontraŭpezas tion tamen la delikate emociplena rerenkontiĝo de la ĝemeloj Viola kaj Sebastiano en tiu sama sceno. Sofia Karakaŝeva, reĝisorino de la prezento, kun kirurga drasto forigis tiujn delikatajn komplikaĵojn. La rolojn de Viola kaj Sebastiano ludis – kun granda talento, cetere – la bela kaj altstatura Diana Najdenova. Kvankam ni kun plezuro spektis ŝian fajnan interpreton de la du ĝemeloj, tio devigis al Karakaŝeva tranĉi la esencon de la rerenkontiĝo kaj – en konsternede reduktita fina akto – esence forviŝi la ŝlosilan komplikecon de la sorto de Malvoljo.

Aliaj ŝanĝoj en la ŝekspira teksto, precipe la inversigo de la du unuaj scenoj, tamen iel sukcesis – kaj kompensis eventualajn mankojn de atento al la subtileco de la intrigo, la energio de la prezento, la belaj kostumoj kaj bona utiligo de la luda spaco. Elstaris Georgi Kiŝkilor, kiu prezentis imponan Sir Tobi, kaj Valentin Ganev, kies rafinita kaj dekadenta prezento de la pajaco brile kaj originale kontribuis al la tuto. Peter Vasilev talente plenumis la etan rolon de Fabiano, kaj Svetla Dobrinoviĉ ludis nekutime kredeblan Olivia. Rurniana Gajtanĝieva, en la rolo de Maria, fizike per-

fekte redonis la esencon de la ŝekspira intenco, eĉ se ŝia papilia ludado iom malemfazis la inteligenton de tiu rolulo.

Nekomprenebla estis tio, ke tuj post la ŝippereo, jam en la komenco de la dramo, Viola aperis vire vestita eĉ antaŭ la decido tion fari, kaj ke ŝia silenta duoblulino en la fina sceno ne estis vestita laŭ sama maniero kiel Sebastiano.

Se oni povas nomi tiun ĉi prezenton tre sukcesa klopodo pri malfacile realigebla verko, kaj se BET kaj ĝia ĉefgvidanto Kiril Draĵev meritas grandajn laŭdojn pro sia atingo, oni ne povas ne bedaŭri, ke al la elparolo de la bulgaraj aktoroj mankis tiu klareco, kiu nepre necesas por subtila ŝekspira teksto. Karakaŝeva bonege sukcesis pri la reĝisorado de la ludado, sed malpli sukcesa estis trejnado pri elparolo kaj konservo de la ŝekspira malsimplo.

Humphrey Tonkin

Laŭdoj kaj fajfoj


Por tiuj, kiuj ne sukcesis pasintjare ĝin spekti, *Sen eliro* de Sartre (tr. Roger Bernard) refoje aperis sur UK-scenejo. La teatraĵo mem tre konvenas al modestrimeda prezento, kaj cetere oni ĝuis senmankan aktoradon de TESPА (Michel Audibert, Sylvie Bonnet, Sylvaine Bourrelly, François Lo Jacomo), sub reĝisorado de Georges Lagrange. La plenpakita, senklimatiza teatra salono iom tro taŭgis al la dramo, kiu okazas en ekzistadisma infero.

Gedojenoj de la Esperanta aktoraro Anani Anev kaj Belka Beleva markis la 25an datrevenon de sia movadsceneja agado per *Malnovmoda komedio* de A. Arbuzov. Ja malnovmoda, do sufiĉe sentimentala, la dupersona drameto eble ne renkontus ĉies entuziasmon, sed ĝi ĝuis ĉi tie duopon, kies talentoj perfekte konvenis al la enhavo. Temis pri la enamiĝo de melanolia sanatoria kuracisto kaj koketa pacientino lia. Ni esperu, ke la paro restos teatre aktiva plian kvaronjarcenton.

Inter la malagrablaĵoj de la semajno estis la originala dramo *Ni vivos* de Julian Modest, en prezento de tro evidente neesperantista hungara trupo "Garabonciás", pri la vivo de Lidja Zamenhof. Estis tolereble, ke tia pionira kontribuo al nia hagiografio iom maltrafu pri la historio kaj pri la karaktero de la protagonisto. La surrealisma enscenigo, kiu i.a. aspektigas Lidjan ia bildstrikajera heroino, vere ne konvenis, sed ankaŭ tion oni povus pardoni. Tamen, kiel elteni, ke la dialogo plej ofte venis unue el plenaŭta sonbenda registraĵo, kiun poste la trupanoj parte ripetis per jen kaj jen hazarde elektitaj vortoj? Ĉu la spektantoj meritis tian infanecan fuŝaĵon? Eble jes: ili ja restis ĝis la fino kaj eĉ aplaŭdis. La aktoraj stiloj variis inter la monotono de Mária Feketes (Lidja), kiu almenaŭ du-tri iom longajn replikojn sukcesis elbuŝigi sen magnetofona suflorado, kaj la histerio de János Beregszászi (Almozulo), kiu



re: **Jadwiga Gibczyńska**



Vario, kiu foje troas

Hungara Nacia Vespero, dimanĉon, la 31an de julio, jam komence de la kongresa semajno aŭguris riĉan kaj kompetente preparitan artan programon, kiun detale prezentis aparta 36-paĝa broŝuro. Éva Farkas-Tatár, kiu redaktis kaj gvidis ĉi tiun Vesperon, montriĝis esti unu el la plej kompetentaj programgvidistoj, kiujn ni vidis sur la scenejo de la Universalaj Kongresoj. En sia redakta laboro ŝi evitis la banalajn kliŝojn, laŭ kiuj folklore prezentiĝas eĉ kongreslandoj, kiuj apenaŭ havas vivantan popolaron, kvankam Hungario certe ne apartenas al tiuj.

La unua parto de la programo enhavis belan ekvilibron inter muziko (opera kaj popola), deklamado, pupateatro kaj arta prezento de proza teksto. Kvankam devis esti kuraĝo kunmeti tiel "malkongruan" programon, ĝi perfekte kongruis kaj trafis ĉies guston kaj intereson. Per la enprogramigo de tiel multaj "vortaj" pecoj (poemo, rakonto, teatro), s-ino Farkas-Tatár honoris la fakton, ke temas pri la kongreso de la parolantoj de lingvo, kaj ne pri renkontiĝo de violonistoj aŭ

kantistoj. Ĝuste tian programkoncepton ni tre malofte renkontis ĝis nun, kaj ni devus memori ĝin kiel bonan modelon.

La duan parton de la Vespero plenumis plurdeko da dancistoj de la ensemblo "Bem", kiuj pruvis, ke Hungario estas prave konsiderata kiel unu el la plej "folkloraj" landoj. Ĉar temis pri unuaranga amatora trupo, ĝi kompreneble dancis pli verve, ol tion farus ajna profesia grupo.

Internacia Korusa Vespero, lundon, la 1-an de aŭgusto, devis esti konkurso inter sep kantistaj ensembloj, sed fine prezentiĝis nur kvin korusoj (unu el Bulgario, kaj po du el Hungario kaj Pollando), dum la intervalojn plenigis simpatia junulara dancgrupo el Pollando. Kvankam la vasto de la salonego neniel konvenis al la relative malgrandaj korusoj, ŝajnis, ke la publiko ĝuas la programon, des pli ke tie aperis ankaŭ du aŭ tri altnivelaj ensembloj kaj ke la tuta vespero estis de speco, kiun ni malofte ĝuas en niaj Kongresoj.

Internacia Arta Vespero, mardon, la 2an de aŭgusto, sub eleganta gvido de Spomenka Štimec (Jugoslavio), devis esti – kaj parte estis – tiu tradicia koncerto, kie ĉefrolas movadaj artistoj. Ankaŭ la programo estis plejparte tradicia, ĉar sur la scenejo reaperis la bonaj kaj delonge konataj kantistoj, kiel Maria Angelova (Bulgario), Alberta Casey (Usono) kaj Veselin Damjanov (Bulgario). Estas aparta

cetere meritas fajfon pro sia mallerta reĝisorado. Pli tranĉan fajfon meritas tiu, kiu konsilis elparoli ĉiun akcentan silabon kun minimume trioblaj daŭro kaj laŭto.

crp

Pintoj de la aktora arto

La pola aktorino Jadwiga Gibczyńska fine prezentis ankaŭ en la Universala Kongreso sian jam de kelkaj jaroj furoran monodramon *Zamenhof*. Ŝi ankaŭ nun pruvis, ke ŝi restas ĉe la supro de la Esperanta teatro, ne nur dank' al suverena rego de la teatra arto, sed ĉi-foje ankaŭ pro la originaleco de sia propra kombino de la diversaj dokumentoj el la vivo de Zamenhof en fascinan scenejan tuton. Gibczyńska tie rolis jen kiel Rozalia (patrino), jen kiel Klara (edzino) aŭ kiel Lidja (filino de Zamenhof).

Novaĵo sur la kongresa scenejo estis la hungara aktorino Ildikó Pécsi en la solista literatura-muzika spektaklo *Leteroj*. Tiu 75-minuta parado de la diverseco de ŝiaj talentoj pli ol pruvis al ni, kial hungaroj distingiĝis ŝin per la titolo "Merita Aktorino". Ŝi meritis porti tian titolon ankaŭ internacie.

Simile oni povus paroli pri Kálmán Szabó en la monodramo *La lasta magnetofonbendo de Krapp* (de S. Beckett), kiun ni menciis jam en nia maja numero ĉi-

jare. Szabó per siaj talento kaj entuziasmo pri Esperanto minacas fariĝi aktoro pri kiu ni povos ofte paroli dum la venontaj jaroj, ĉar li venas rekte el la aktora "Mirlando" (tion li indikis sur sia kongresa nomŝildo). Lia monodramo estis prezentita kombine kun la *La mortintoj de Spoon River* (de la usona aŭtoro E.L. Masters) sub la ŝildo de Hungara Esperanto-Teatro.

Prezentiĝis ankaŭ *La kastelo de l' blubarba princo* de B. Balázs en la interpreto de la ensemblo "Garabonciás" kaj la pupateatraĵo *Johano la brava* de Petőfi/Kalocsay en adapto de Roberto Bánky. La anoncita recitalo de Petőfi-poezio en la interpreto de Gabi Jobba ne okazis pro malsano (kaj, baldaŭ post la Kongreso, morto) de la aktorino. La pasintjara furoraĵo *Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' profeto?* de J. Elem trovis kuraĝon prezentiĝi sur la scenejo de la kongresa ĉefsalono, kie ne mankis ankaŭ ĉi-foje entuziasmaj aplaŭdoj. Cetere, ĉiuj aliaj teatraĵoj disponis pri la perfekta scenejo de la Kulturcentro "Pataki István", kiu bedaŭrinde situas iom for de la kongresejo, tiel ke multaj kongresanoj malprave timis malfacilaĵojn atingi ĝin.

Ĉu ni ripetu la budapeŝtan abundon de teatraĵoj en niaj Kongresoj? Ne, ni ne faru tion, ĉar la investita laboro larĝe superas la montritan intereson de la kongresa publiko.

sm



Anna Kiss kaj Gábor Németh dum la Nacia Vespero.

demandoj, ĝis kiu grado oni rajtas miksi en unu programo tri kantistojn de tiel malsamaj voĉpotencialoj kaj repertuaroj. Novaj estis la franca pianistino Françoise Chevrier, la grupoj el Armenio kaj Litovio

(Soveta Unio) kaj la deklamantino Vera Dehler (Germana DR). Miksiĝis tie ankaŭ pup teatra kaj popoldanca kontribuoj de trupoj, kiuj aperis ankaŭ en la Hungara Nacia Vespero. Tio neniel necesis, des pli ke la tuta programo daŭris tro longe.

Kvankam la aplaŭdoautomato de la publiko abunde funkciis ankaŭ dum ĉi tiu programo, ni direktu al ĝi tri kritikajn rimarkojn:

La Esperanto-movado disponas pri tiel multaj bonaj kantistoj kaj aliaj muzikistoj, ke eblus fari plurajn altkvalitajn koncertojn el ilia repertuaro. Ni ne atendu, ke la samaj artistoj daŭre reaperadu en la Kongresoj kaj sekve ankaŭ en la kongresaj koncertoj. La organizantoj laboru por venigi en tiajn programojn novajn vizaĝojn.

Eraro estas meti tian programon en la komenco de la kongresa semajno, ĉar tio malebligas la necesajn provludojn, kaj, ekzemple, bonan konatiĝon de kantisto kun sia instrumenta akompananto.

Oni anticipu sciu, kion oni organizas: koncerton de klasika muziko, dancvesperon aŭ pupteatron. Kombino de tiaj elementoj en unu programon fariĝas malfacile digestebla mikspoto, kiun apenaŭ sukcesas savi eĉ tiel lerta programgvidisto, kian ni havis en Budapeŝto.

PEDAGOGIA PROGRAMO

Seminario en Gyula, Tago en Budapeŝto

Konforme al pasintjara rekomendo de la Komitato, dum la semajno antaŭ la 68a UK okazis la Unua Pedagogia Seminario de UEA. Ĝi estis konsista parto de la 21a sesio de Somera Esperanto-Universitato (SEU) en Gyula (ĉ. 200 km sudoriente de Budapeŝto), kiun partoprenis 102 personoj el 15 landoj.

La Seminarion, kies ĉefaj organizantoj estis Zsuzsa Barcsay kaj Zsolt Gyarmathy, konsistigis prelegoj, modellecioj, praktikaj ekzercoj kaj diskutoj. Krome, la seminarianoj ĉeestis plurajn prelegojn de SEU, ĝuis ekskursojn kaj koncerton, vizitis ekspoziciojn (i.a. tiun pri Esperantaj lerniloj el la fama kolekto de Károly Fajsz) kaj pasigis memorindan kaj tre utilan semajnon.

Inter la prelegantoj estis B. Ragnarsson (moderna Esperanto-poezio), H. Behrmann (lingvolaborato-

rio), F. Simonnet (fremdlingva instruado), Zs. Barcsay (modernaj formoj de Esperanto-instruado). Okazis ankaŭ aliaj prelegoj (aŭ kolokvoj): I. Szanser (interferaj fenomenoj en lingvo-instruado), L. Åberg (instrumaterialo por intensaj kursoj), F. Simonnet (tradukado kaj uzado de vortaroj), B. Ragnarsson (gepatralingva instruado en Islando), M. Mullarney (familia anstataŭ lerneja edukado). Modelleciojn prezentis E. Formaggio-Vilisics kaj A-M. Brissot.

Simile intensan programon havis ankaŭ la Tago de la Lernejo, la 4an de aŭgusto, en la 68a UK, kun la ĉeftemo "Esperanto-instruado kiel kontribuo al la interkultura informado", pri kio enkonduke prelegis la estrarano Ragnarsson. Prelegis ankaŭ d-roj Szerdahelyi (instruado de landkonoj) kaj T. Dahlenburg (fremdlingva instruado kaj la posedo de la gepatra lingvo). Ankaŭ tie okazis modellecioj kaj diskutoj, programeto de infanoj, kiuj denaske lernas Esperanton, kaj kelkaj aliaj aranĝoj en la plenstopita programo.

Aparte menciinda estas la akcepto ĉe la Sindikato de Pedagogoj, la 2an de aŭgusto, kun partopreno de ĉ. 25 diverslandaj Esperanto-pedagogoj, kiuj montris grandan intereson pri la hungara lerneja sistemo.

Granda intereso pri la infanaj aranĝoj

En la kadro de la 68a UK okazis du apartaj aranĝoj por la infanoj: la 20a Internacia Infana Kongreseto (kun 41 infanoj el 11 landoj) kaj Internacia Infana Tendaro (kun 87 geknaboj kaj 20 gvidantoj el 6 landoj).

La Kongreseton organizis Zsuzsa Barcsay, kaj gvidis Zsuzsa kaj Ernő Csíszár (Hungario), helpe de M. Grela (Belgio), Ch. Fettes (Irlando), B. Pochanke (Pollando), J. Horváth (Hungario), I. Frank kaj B. Frank-Böhringer (FR Germanio) kaj K. Vasiljevna (Bulgario).

Montriĝis, ke pluraj infanoj jam konas unu la alian el la antaŭaj Kongresetoj, kio dekomence bone influis la etoson en la kongresetejo, iama princa kastelo ĉe la periferio de Budapeŝto. La programo de la Kongreseto estis tre varia: vizitoj al palaco, urba parko, strando, pupteatra spektaklo, infanfervojo, ŝipa ekskurso al la pitoreska urbeto Szentendre apud Budapeŝto.

Ankaŭ en la kongresetejo estis interese kaj vigle: gimnastiko, desegno-konkurso, dancoj kaj kantoj, vizitoj de la pupteatra aktorino E. Szabó-Regőczy kaj la magiisto Á. Szegedi; prof. So Gil-su (Korea Respubliko) entuziasmigis multajn infanojn per sia gaja konversaciemo kaj lerta ludigo de la ĉeestantoj.

Ĝenerale, la Kongreseto tre bone sukcesis kaj plene respondis al la postuloj, kiujn antaŭ ĝi metas la Kongresa Regularo. Tiu Regularo diras tamen ankaŭ jenon: "Ĝi celas kuraĝigi familiojn kaj instruistojn instrui Esperanton al la infanoj; krei kontakton inter diverslandaj gejunuloj, kiuj jam scias la lingvon; montri al la publiko la servojn de Esperanto por pli bona internacia interkompreno."

Tiu publiko, t.e. la hungaraj gazetaro, radio kaj televido, tre abunde ekspluatis la informan valoron de la Kongreseto kaj de la menciita Infana Tendaro. Ĵurnalistoj kaj filmistoj svarmis ĉiutage en la Kongreseto. Aperis pluraj ampleksaj artikoloj kaj multaj malpli grandaj tekstoj en preskaŭ ĉiuj hungaraj gazetoj. La infana programo de la Hungara Radio intervjuis infanojn el naŭ landoj. Ne nur la hungara sed ankaŭ la bulgara televido raportis pri la infanoj, kiuj "venkis la lingvan baron". Ŝajnas, ke multaj inter ni en la Movado ankoraŭ ne sukcesis malkovri la grandan informan potencialon de ĉi tiaj aranĝoj, des pli ke la Kongreseto en Budapeŝto estis kaj facile atingebla kaj malmultekosta.



Kongresa Komuniko

**69a UNIVERSALA KONGRESO
DE ESPERANTO, Vankuvero (Kanado)
1984 07 21 – 07 28**

**Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
3015 BJ Rotterdam, Nederlando.**

**Adreso de LKK: 53 North Boundary,
Vancouver, B.C., Kanado V5K 3S4.**

Internacia Kongresa Universitato: En la kadro de la 69a UK en Vankuvero okazos la 37a sesio de Internacia Kongresa Universitato. Universitataj profesoroj kaj simile kvalifikitaj personoj povas proponi prelegon al la Komisiono pri IKU ĉe ties sekretario: prof. Bruce Sherwood, 252 Engr. Res. Lab., 103 S. Mathews, Urbana, IL 61801, Usono. Al tiu adreso oni sendu fotoportreton kaj kvar kopiojn de titolo,

resumo, bibliografio kaj biografieto antaŭ la 10a de januaro 1984. Prelegantoj ricevos danksumon sed ne vojaĝajn kostojn.

Oni aparte invitas proponojn de junaj universitataj instruistoj kaj profesoroj, kiuj ankoraŭ ne prelegis en IKU. Eble vi en la landaj asocioj konas taŭgajn personojn, kiuj ne mem proponus sin. Vi estas petataj, bonvole stimuli viajn fakajn samlandanojn partopreni.

Prof. P. Collinge estas elektita Rektoro de la 37a sesio de IKU.

Aliĝiloj: Aliĝiloj por la 69a UK, la Unua Bulteno kaj informo pri la ĉirkaŭkongresaj ekskursoj en Usono estas dissenditaj kun la septembra numero de ĉi tiu revuo, kaj al landaj asocioj kaj perantoj. Pliaj aliĝiloj estos dissenditaj kun la revuo en januaro 1984, sed en tiu monato la dua kotizperiodo ekvalidas. Notu bone, ke eblas aliĝi ĝis la fino de 1983 laŭ la unua, plej malalteka tarifo. Aliĝiloj kaj informiloj estas haveblaj ĉe la konstanta adreso.

KONGRESAJ INSIGNOJ DE VANKUVERO

Por reklami la 69an Universalan Kongreson, okazontan venontjare en Vankuvero (Kanado), LKK pretigis limigitan kvanton da oficialaj kongresaj insignoj en speciala eldono. Ili estas unika kanada fabrikaĵo el arĝentita kupro, en proksimuma grandeco de 22×17 mm. La insigno montras la kongresan simbolon (indianan totemfoston), la vortojn "69a UK de Esperanto" kaj la verdan stelon en la fono.



La insignoj estas jam nun haveblaj: **kvante** (minimume 10 ekz.) ĉe LKK (53 North Boundary, Vancouver, B.C., V5K 3S4) kontraŭ 3 kanadaj dolaroj por ĉiu ekzemplero, plus 10 % por la sendokostoj; **unuope** ĉe la Libroservo de KEA (765 Braemar, R.R.2, Sidney, R.C., V8L 3S1) kontraŭ 4 kanadaj dolaroj, plus 10 % por la sendokostoj. Ankaŭ pluraj aliaj libroservoj vendas la insignon. Krome, **nur ĉe LKK** estas havebla tre limigita kvanto da purarĝentaj insignoj kontraŭ 10 kanadaj dolaroj, plus 3 kan. dolaroj por afranko kaj poŝta registro.

Loka Kongresa Komitato: s-ro W.G. Du Temple (prezidanto), s-ro B. Kaneen (vicprezidanto), s-ino M. Zacherl (kasisto), s-ro E. Woodruff (sekretario), s-ro W. Zacherl (loĝiga servo), s-ino M. Evans (informado), s-ro W. Deers (ekskursoj), s-ino A. Whittaker kaj s-ino J. Fremont (enlanda informado), s-ro T. Hess kaj s-ino I. Beharry Lall (artaj aranĝoj), s-ino O. Du Temple (libro servo), s-ro Z. Tušanov (gazetara servo).

Kiel atingi Vankuveron? La oficialaj flugkompanioj de la 69a UK estas la konataj naciaj flugkompanioj *CP Air* kaj *Air Canada*, kiuj kunlaboras por subteni la Kongreson. Tiu kunlaboro jam portis tre pozitivajn rezultojn. Tamen, la Kongreso ne estas katenita al tiuj kompanioj, kaj UEA nun aktive serĉas la plej ekonomiajn flugojn por venigi kongresanojn al Vankuvero kaj antaŭkongresa vizito al Montrealo; ĝi ankaŭ aranĝas flugojn al Nov-Jorko, por tiuj, kiuj volas partopreni dusemajnan ekskurson tra Usono. Pliaj detaloj estos dissenditaj verŝajne antaŭ la fino de la jaro.

Ĉirkaŭkongresaj aranĝoj: De la 14a ĝis la 20a de julio 1984 okazos turisma antaŭkongreso en Montrealo. Detaloj estas haveblaj de s-ino Louise Labelle, 10617 Oscar, Montréal, Québec, Kanado H1H 5J8. Du ekskursoj tra usono, de la 7a ĝis la 21a de julio kaj de la 28a de julio ĝis la 10a de aŭgusto, ebligas al la kongresanoj ekkoni multajn partojn de tiu lando. La ekskursoj estos gvidataj de Esperantaj ĉiĉeronoj. Oni vizitos ne nur turismajn vidindaĵojn sed ankaŭ la hejmojn de lokaj esperantistoj survoje. Detaloj estas haveblaj de Esperanto-Vojaĝservo de ELNA, p/a Howard Travel Service, 578 Grand Avenue, Oakland CA 94610, Usono, aŭ de UEA mem.

Kongresaj ejoj: La Universitato de Brita Kolumbio havas belan, marbordan terenon ĉe la rando de la urbo Vankuvero. Tie, izolita de trafiko kaj aliaj kutimaj urbaj ĝenaĵoj, disvolviĝos la 69a UK. Du grandaj apartamentaroj provizos la loĝlokojn por ĉiuj kongresanoj. Ne necesas fari longan ĉiutagan vojaĝon de la loĝloko al la kongresejo. Manĝoj estos provizitaj

en studenta restoracio. La ĉirkaŭaĵo kaj la universitata etoso certe ravis kaj ripozigos la kongresanojn.

La provinco Brita Kolumbio tiom fieras pri sia beleco, ke ĝia provinca slogano estas "Bela Brita Kolumbio". Tiun sloganon pravigos ne nur la restado en la kongresa tereno, sed ankaŭ la ekskursoj, kiuj montros al kongresanoj unike belajn kanadajn pejzaĝojn.

Kotizoj: Unuafoje por la 69a UK validas la nova Kongresa Regularo, kiu grave simpligis la antaŭan disdividon de la aliĝkategorioj. La Regularo enkondukas la koncepton de "kunulo" (persono loĝanta samadrese kun aliĝinta kongresano), kiu pagas 25 % malpli.

Ĝis la fino de 1983 validas jenaj aliĝkotizoj: 1) Kongresano kiu ne estas individua membro de UEA – 175 guldenoj; 2) Kongresano kiu estas individua membro de UEA – 140 guldenoj; 3) Kunulo/junulo/handikapulo kiu ne estas individua membro de UEA – 105 guldenoj; 4) Kunulo/junulo/handikapulo kiu estas individua membro de UEA – 70 guldenoj.

La 1-an de januaro 1984 ĉiuj aliĝkotizoj altiĝos je 35 guldenoj. Sama altiĝo okazos ankaŭ post la 14a de majo 1984.

Karavanaj aliĝoj: Aparta Karavana Regularo pri grupaliĝoj estas havebla ĉe la konstanta adreso de la Kongreso. Tiuj, kiuj povas kunigi minimume 25 kongresaliĝojn, havas eblecon ŝpari ĝis 119 guldenojn por ĉiu kongresano, se oni pagas jam en la unua kotizperiodo. Precipe la landaj asocioj kaj kongresaj perantoj povas peti pliajn detalojn ĉe la konstanta adreso.

40a Internacia Junulara Kongreso de TEJO: Kiel konate, la junulara kongreso ne okazos en Kanado sed en Swanwick, en nordorienta Britio, de la 13a ĝis la 20a de julio 1984. La partoprenantoj de la 40a IJK ankaŭ en 1984 rajtos je senpaga aliĝo al la Universala Kongreso. Detalojn pri la 40a IJK petu ĉe: Esperanto-Centro, 140 Holland Park Avenue, London, Britio W11 4UF.

● **Brazilo:** Komunan Brazilan Esperanto-Kongreson organizos en 1984 la tri landaj asocioj Brazila Esperanto-Ligo, Kultura Kooperativo de Esperantistoj kaj Brazila Konsilantaro de Esperanto. Tiu decido, atesto pri la kreskanta kunlaboro inter la tri asocioj, rezultis el diskutoj dum la 16a Brazila Seminario de Esperanto en julio ĉi-jare.

● **Britio:** La Loka Kongresa Komitato de la 68a Brita Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Weston-super-Mare de la 25a ĝis la 28a de majo venontjare, anoncas, ke eksterlandanoj ne devos pagi aliĝkotizon. Interesitoj skribu al: S-ro P.C. Willey, 4B Highfield Drive, Portishead, Bristol, BS20 8JG, Britio.

● Esperanta tendo altiris multan atenton dum brita tendaro de kelkaj miloj da ekologie interesitaj homoj apud Glastonbury, de la 26a ĝis la 31a de julio. La organizinto de la tendo, s-ino Jenny Goddard, parolis pri Esperanto kaj instruis i.a. infanojn, kio ricevis mencion en la nacia ĵurnalo *The Guardian*.

● La 16a jarraporto de Jubilea Esperanto-Fonduso Norwich sciigas, ke ĝi en 1983 havis kapitalon de 15 750 pundoj

(69 300 gld). Tio ebligis al ĝi subteni diversajn Esperantajn agadojn dum la pasinta jaro per sia rekorda rento de 9 460 gld. Tiaj fondusoj povas grave utili al la Movado, kiel montras la interesa konstato, ke ĉiu ano de la Loka Kongresa Komitato por la venonta Internacia Junulara Kongreso en Britio iam ricevis financon helpon de la Fonduso.

● **Bulgario:** De la 18a ĝis la 24a de julio okazis en Veliko Tarnovo, Bulgario, la 1-a Internacia Somera Esperanto-Universitato kun ĉ. cent partoprenantoj. Salutparoladon faris la rektoro de la loka universitato Cirilo kaj Metodo, prof. Angel Davidov.

● **Eŭropa Komunumo:** Dum la Konferenco pri Plurlingveco en Eŭropo, Bruselo, 27-31 aŭgusto, organizita de la Eŭropa Klubo, okazis vizito al la Eŭropa Komisiono. Tie unu el la funkciuloj diris, ke oni produktus Esperantan version de filmo pri la Eŭropa Komunumo kiam la buĝeto ebligus tion kaj se montriĝus esti sufiĉe da intereso. Tiusence skribu al s-ro B. Pianetta della Stufa, Informa Centro Robert Schumann, rue

de la Loi 149, B-1049 Bruselo. Anoj de la dek landoj de EK skribu prefere en unu el ties oficialaj lingvoj; aliaj povas skribi en Esperanto. Por pliaj informoj: Eŭropa Klubo, pk. 3, B-1040 Bruselo, Belgio. (Vidu ankaŭ artikolon pri la Konferenco pri Plurlingveco en nia novembro numero.)

● **Hinda Unio:** Federacio Esperanto de Bharato okazigos sian duan tutlandan Esperanto-kongreson en Nandi Hills, apud Bangalore, de la 30a de decembro ĝis la 1-a de januaro 1984. Se vi interesiĝas partopreni, tuj kontaktu d-ron P.V. Ranganayakulu, Post Box 566, Vijayawada 520 003, Hinda Unio, ĉar la nombro de partoprenantoj estos limigita. Oni informas, ke eksterlandaj aliĝintoj ricevos apartajn dulitajn ĉambrojn kaj, ke la vetero estos milda. La kotizo por eksterlandanoj estas pagebla al UEA.

● **Italio:** La Esperanto-rubriko en *Rivivere*, arta-sciencia-kultura revuo (neesperantista) senĉese progresas. En la julia numero ĝi atingis rekordan amplekson: 13 paĝojn, t.e. trionon de la tuto! La revuo estas kulture interesa kaj altnivela, lukse presita kaj kun multpaĝa enhavo. Adreso: Via Lazzaretto 1, I-47100 Forlì, Italio.


● **Norvegio:** En junio ĉi-jare la Reĝa Ministerio de Eksteraj Aferoj de Norvegio eldonis grandformatan 8-paĝan informilon pri *La fostokirkoj de Norvegujo*. Ĝin verkis Roar Hauglid, la Estro de Naciaj Antikvaĵoj, kaj ĝi estas senpage ricevebla de: Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schousvei 18, Oslo 5, Norvegio.

● **Jugoslavio:** Post la Universala kongreso en Budapeŝto, je invito de Kroatia Esperanto-Ligo, vizitis Kroation dum 20 tagoj kvarpersona delegitaro de Ĉina Esperanto-Ligo. La delegitaro, sub la gvido de s-ro Zhang Qicheng, renkontiĝis kun pluraj respondeculoj de oficialaj instancoj i.a. sindikataj kaj junularaj.


● La supre menciita ĉina delegitaro vizitis ankaŭ la *Insulon de Juneco* en Adriatika Maro. La insulo, alinomita Isnuslo Obonjan, apud la urbo Ŝibenik, estas somerumejo por ĝis du mil jugoslavaj gejunuloj. Tie Kroatia Esperanto-Ligo aranĝis en aŭgusto sukcesan Internacian Esperantistan Tendaron, kiun partoprenis 50 gejunuloj el naŭ landoj. Se vi interesiĝas partopreni en la venontjara tendaro, petu informojn de KEL, (por Insulo de Juneco), Amruŝeva 5, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.



● **Italio:** Ĉe la 4a Kunveno por Amikeco inter la Popoloj en Rimini, 21-28 aŭgusto, vizitis la Esperanto-standon ne nur ĉiliaj televidistoj por filmi sed ankaŭ s-ro Arnaldo Forlani, vicprezidanto de la Itala Ministra Konsilio. Dekstre sur la foto s-ro Forlani rigardas ekzempleron de *El popola Ĉinio* kun pastro Duilio Magnani (maldekstre) kaj s-ro Nikola Sanese, subsekretario de la Ministerio pri Komerco. (Pliaj informoj pri la ĉiujara junulara aranĝo estas riceveblaj de: Meeting per l'amicizia fra i popoli, Via del Capriolo 3, I-47037 Rimini, Italio.)



● **Azio:** Ĉe la Junulara Domo de Sibukawa en la gubernio Okayama, Japanio, okazis la 30an kaj 31an de julio la 2a Komuna Esperanto-Seminario inter Korea kaj Japana Junularoj, kiun partoprenis naŭ koreoj kaj 38 japanoj. La ĉefa temo de la seminario estis "La Esperanto-movado en ambaŭ landoj". De la korea flanko s-roj Song Ho (sur la foto dekstre) kaj Bjonghuan Gim prelegis pri la sialanda Movado, dum s-ro Kazunori Morikawa prezentis junularan Movadon de Japanio. Post la tri prelegoj sekvis demandoj kaj respondoj, kaj oni dividis la ĉeestantojn en kvin laŭtemajn diskutgrupojn. En ĉiuj grupoj ardis diskutoj, dum alia grupo zorgis pri komencantoj per la rekta metodo. La postan tagon sekvis entute naŭ prelegoj pri tre diversaj temoj. Oni ankaŭ sportis kaj ludis. La partoprenantoj de la seminario decidis, ke la 3a Komuna Esperanto-Seminario okazu en Korea Respubliko en 1984, kaj eble per tio oni rajtas aserti, ke ĉi tiu laŭdinda iniciato en Azio jam fariĝis tradicia, helpe al la esperantista junularo de ambaŭ landoj. Oni cetere elektis s-ron Kazunori Morikawa la peranto en Japanio por la 3a Seminario, de kio oni esperas pri harmonia kunlaboro inter la diversaj japanaj Esperanto-organizaĵoj kun junaj membroj.



● **Medicino:** Festas sian dekjaran datrevenon la Esperanta gazeto *Medicina heroldo*, redaktata kaj subtenata de d-ro Hélio F. Aderne. La gazeto, kvankam modesta, havas legantojn en 30 landoj. Adreso: str. Domingos Grosso 53, Venda Nova, BR-30 000 Belo Horizonte MG, Brazilo.

● **Evoluigaj problemoj:** La organizaĵo de Svedaj Mondfederalistoj kaj la Komitato de la Monda Asocio de Mondfederalistoj por Plifortigi Unuiĝintajn Naciojn aranĝas korespondan konferencon pri internaciaj evoluigaj problemoj. La leterkonferencon finance subtenas SIDA (la sveda buroo por internacia evoluigo). Interesitoj estas petataj verki artikolon de 5 ĝis 12 paĝoj. Pliaj informoj estas haveblaj de: S-ro Hans

Regnell, Prez. de la Svedaj Mondfederalistoj, Tornaplatzen 2, S-223 63 Lund, Svedio.

● **Geologio:** Honore al la 27a Internacia Geologia Kongreso, okazonta en aŭgusto 1984 en Moskvo, la Scienca Eldona Centro de UEA planas aperigi kvinan volumon de *Geologio internacia*. Estas bonvenaj artikoloj kaj reklamoj. Informiĝu ĉe: SEC, Pf. 193, H-1368 Budapeŝto, Hungario.

● **Malsato:** Dum la UK en Budapeŝto oni distribuis informilon en Esperanto pri la organizaĵo Malsato-Projekto. Tiuj, kiuj deziras konatiĝi kun la klopodo malpliigi malsaton en la mondo, skribu al: Malsato-Projekto, Davidgasse 79, A-1100 Wien, Aŭstrio.

● **Stomatologio:** La Stomatologia Sekcio de UMEA raportas pri bonaj rezultoj post sia fondo antaŭ unu jaro. Ĝi aperigas kvaronjaran periodaĵon *Stomatologia forumo*, senpage haveblan por la membroj, kaj informas, ke la trilingva dentoteknika vortaro de M. Pavlik estas prespreta. Kadre de la budapeŝta UK la Sekcio aranĝis la unuan renkontiĝon de esperantistaj dentistoj, kiu nun havas anojn en 18 landoj. Interesitoj pri la ankaŭ alikampe aktiva Sekcio skribu al: D-ro Balázs Szemőrk, Pozsonyi ut 2, H-2737 Cedlégbercel, Hungario.

● **Radio:** Ŝajnas, ke eĉ la brita nacia radio nuntempe sentas sin devigata de tempo al tempo informi pri Esperanto. Nome, BBC elsendis tre pozitivan 7-minutan disaŭdigon pri la Internacia Lingvo antaŭ la UK en Budapeŝto. Temis pri ero en la regula programo "De nia propra raportisto" la 12an de julio. La tutan programon oni ripetis poste la saman tagon.

● De la 11a de julio Radio Polonia elsendas ses fojojn ĉiutage en Esperanto. Al la ĝisnunaj disaŭdigoj aldoniĝis plia programo de 15h30 ĝis 15h55 laŭ Universala Tempo (antaŭe Grenviĉa Meza Tempo) per la ondoj 41,18m (7285 kHz) kaj 31,01m (9675 kHz). La Esperanto-redakcio de la stacio ŝanĝas la kadran programon. Pro tio ĝi aparte petas la aŭskultantojn sciigi, ĉu ili deziras pli da Esperantaj temoj. Proponojn volonte ricevas: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00950 Warszawa, Pollando.

● **Scienco:** Inter la 27a de decembro ĉijare kaj la 7a de januaro 1984 okazos en San-Marino San-marinaj Universitataj Semajnoj. Oni planas tutan aron da prelegoj kaj kursoj universitatnivelaĵoj en la Internacia Lingvo kaj jam ricevis oficialan apogon de aŭtoritatoj en tiu eta respubliko, ĉirkaŭita de Italio. Kadre de la Semajnoj okazos ankaŭ membrokunveno de la nove fondita Tutmonda Asocio pri Kibernetiko, Informadiko kaj Sistemiko. Por detalaj informoj pri la tuta aranĝo skribu al: Instituto pri Kibernetiko, Kleinenberger Weg 16B, D-4790 Paderborn, FR Germanio.

● **Skoltoj:** De la 4a ĝis la 14a de julio du reprezentantoj de Skolta Esperanto-Ligo kaj lokaj esperantistoj funkciigis ekspozicion pri Esperanto 12-hore tage dum la Monda Skolta Ĵamboreo apud Calgary, Kanado. Oni disdonis milojn da flugfolioj kaj centojn da informbroŝuroj en naŭ lingvoj. Kaj skoltoj kaj gvidantoj montris grandan intereson pri la ekspozicio.

Persone

● **Pettyn:** Inter la fino de septembro kaj komenco de oktobro la konata estro de la Esperanta redakcio de Radio Varsovio Andrzej Pettyn vizitis Finnlandon, kie li i.a. partoprenis la Vintrajn Tagojn de Esperanto-Asocio de Finnlando en Tampere.

● **Sadler:** Dum sia unua prelegvojaĝo brazila, en julio-aŭgusto, d-ro Victor Sadler vizitis 11 urbojn de la ŝtatoj Minas Gerais, São Paulo, Rio de Janeiro kaj Paraná, farante 18 paroladojn antaŭ Esperanto-organizaĵoj kaj universitata aŭ ĝenerala publiko. Rezultis 12 intervjuoj por ĵurnaloj, radio kaj televido,

krom multaj koncizaj informoj. Li estis akceptita de universitataj rektoroj kaj estis deklarita "oficiala gasto" de la urbo Bauru. Survoje li vizitis ankaŭ la sidejojn de la tri landaj Esperanto-asocioj. Sadler planas entrepreni pliajn prelegvojaĝojn en la venontaj monatoj, al aliaj regionoj de tiu vasta lando.

● **Støp-Bowitz:** En la komenco de julio prof. Carl Støp-Bowitz, iama vicprezidanto de UEA, partoprenis la 1-an Internacian Konferencon pri Polihetoj en Sidnejo, Aŭstralio. Poste li prelegis pri Norvegio en la Esperanto-klubo de Sidnejo kaj Manly. Lia konata intereso pri vermoj altiris lin ankaŭ al Melburno, en kies ĉirkaŭaĵo vivas aparta specio. Je sia ĉagreno prof. Støp-Bowitz sukcesis elfosi nur idojn de ĝis unu kaj duona

metroj, dum la plenkreskaj vermoj ŝajne povas atingi tri metrojn! Li poste vizitis ankaŭ la Esperanto-klubon de Melburno.

● **Tonkin:** De post la 1-a de septembro d-ro Humphrey Tonkin, vicprezidanto de UEA, estas la rektoro de la Ŝtata Universitata Kolegio en Potsdam, Ŝtato Nov-Jorko, Usono. La kolegio, kiu proponas ĉiujn ĉefajn universitatajn studbranĉojn, havas kvar mil studentojn.

● **Umeda:** Komence de aŭgusto la nova vicprezidanto de UEA, s-ro Yosimi Umeda el Japanio, vizitis Korean Respublikon, por renkonti la prezidanton de Korea Esperanto-Asocio kaj pli bone konatiĝi kun la tiea movado. Li ĉeestis ankaŭ Esperanto-kursojn.

Oficiala Informilo

KOTIZTABELO 1984

Dekstre vi trovas la novajn kotizojn por 1984. La Komitato de UEA akceptis en Budapeŝto altigon de la baza guldena kotizo je 12% por kompensi inflacion de 4% jare de post la lasta altigo en 1980. Fakte, niaj kostoj altiĝas pli ol 4% jare!

Ni mildigis kiel eble plej multe la altigon por landoj kun malalta vivnivelo kaj apartaj ekonomiaj malfacilaĵoj. Kelklande kotizoj ne altiĝis, iuj eĉ malaltiĝis. Ni denove fiksas kotizojn en guldenoj por landoj kun forta inflacio.

Niaj kotizperantoj staras servopretaj. Estu inter la unuaj por rememrigi. Nia administracio malŝatas lastmomentajn inundojn, kaj dankos vin kore!

DU NOVAJ ĈEFDELEGITOJ:

Ni anoncas novajn ĉefdelegitojn en Brazilo kaj Britio. Ili estas respektive s-ro Ivan Barbosa, Rua Quintino Bocaiuva 616, BR-17100 Bauru (SP) kaj s-ro Geoffrey King, 228 Capworth Street, London, E10 7HL. En ambaŭ landoj la kotizperado restas en la prizorgo de la Landaj Asocioj.

Ni kore dankas s-ron G. Grattapaglia, kiu dum ses jaroj prizorgis la ĉefdelegitan laboron en Brazilo. Dum tiu tempo la nombro de delegitecoj kreskis de 140 ĝis 233. Forlasis la oficon en Britio s-ro J. Rapley, kiu ekde nun ligiĝas eĉ pli proksime al la Asocio, per ekdeĵoro en la Centra Oficejo.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Bulgario: Antoaneta Atanasova. Hungario: B. Földvári. Nederlando: J.S. Rooke.

SOCIETO ZAMENHOF 1983

Brazilo: Francisco de Souza Almada; Marija Pozder Almada. Francio: Jack-André Rousseau. Italio: Ranieri Clerici. Svedio: Astrid Feuk. Svislando: Margrit Guldin.

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

PATRONOJ (minimumo \$100): Argentino: Rafael Diaz Morilla. Aŭstralio: Barbara C. Williams; F.F. Koppel. FR Germanio: Bruno Vogelmann. Hispanio: Adam Goralski; Kristina Krause de Goralski. Japanio: Masahisa Niwa. Kanado: Bruce R. Crisp; Dorothy M. Hawley. Korea Resp.: Yung-myung Kim. Usono: Julie M. Dinnel; E. Delia Simpson; Margot H. Gerson.

SUBTENANTOJ (minimumo \$25): Aŭstralio: Ralph Harry. Aŭstrio: Esperanto-klubo Verda Stelo; Gottfried Hofstätter; Hans Zeller. Brazilo: Cleber de Moraes Lemos. Danlando: Georg Kustos. Islando: Stefán Sigurdsson. Nederlando: Ingeborg M.J. Dijkhoff-Lenze. Usono: Esperanto Society of Washington; Humphrey Tonkin.

AMIKOJ (minimumo \$10): Belgio: Léa Bernaerts-Toussaint. FR Germanio: Friedrich B. Hilpert; Frank Selten; Josef Fischer; Rudolf Brand. Israelo: Andreo

Ŝalamon; Jeraĥmiel Giladi. Kanado: Myra Larson; Trefflé Mercier. Usono: Irving Shanker; Isolde Etzensberger; Ernest E. Kovary; Manda Tata; Philip Chenoweth; Steve Adler.

PATRONOJ DE TEJO 1983

Britio: J.P.R. Palfrey. Hispanio: Juan Ripollés Vallés.

DONACOJ 1983 (Gld.)

ĝis la 30a de septembro

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: K. Hata 111,11; G. Pirlot 37,12. Brazilo: Marija Almada 25,00. Danlando: Astrid Birkbak 10,00. Francio: F. Cadenel 55,70; B. Wick 24,23. FR Germanio: O. Gessner 134,23. Kanado: Dorothy Hawley 22,15. Meksikio: Julie Regal 89,77. Nederlando: W.P. Roelofs 1 843,05 (2000 steloj); E.C. v.d. Linde 100,00; F.D. v. Zoest 10,00; E.S. Otto 100,00; G. Hos 25,00; G.J.J. Gerritse 100,00; Geja Libereco 15,00; G. Sutton 100,00; R. Moerbeek 600,00; G. Berveiling 50,00; E.J. Woessink 100,00; F.J. Pieterse 50,00; J.S. Rooke 37,50; M. C. J. v.d. Graaf 50,00; anonima 800,00. Norvegio: Alf R. Grødland 33,37. Svedio: Y. Nilsson 38,16; E. Swärd 19,03. Svislando: Max Kübler 138,79; M.A.W. Schoutsen 100,00; P. Enz 135,96. Anonime: 10,88. Sumo ĉi-jara 8 568,28.

FONDAĴO CANUTO: Brazilo: Marija Almada 25,60. Nederlando: E.J. Woessink 100,00; M.C.J. v.d. Graaf 50,00. Sumo ĉi-jara 3 600,23.

ĜENERALA KASO: FR Germanio: F. Hilpert 12,95. Greklando: E. Patmiu 150,85. Nederlando: J. Dunnewold 25,00. Svislando: Margrit Guldin 13,80. Diversaj malgrandaj 0,40. Sumo ĉi-jara 3 628,98.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J. v.d. Teems 20,00; B.M. Slösser 100,00. Sumo ĉi-jara 190,00.

BUDAPEŝTA OFICEJO (TERMINOLOGIA SEKCIO): FR Germanio: R. Painter 1 118,38. Nederlando: R. Moerbeek 25,00. Sumo ĉi-jara 4 497,82.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: Meksikio: Julie Regal 59,80. Sumo ĉi-jara: 2 189,80.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

KOTIZTABELO POR 1984

Lando/valuto	AM	MJ(-K)	MA(-K)	SA	Kto	SZ
Argentino/gld.	0,80	16	40	24	12	80
Aŭstralio/dolaro	0,54	10,80	27	16,20	8,10	54
Aŭstrio/ŝilingo	8,40	168	420	252	126	840
Belgio/franko	25	500	1250	750	375	2500
Brazilo/gld.	0,80	16	40	24	12	80
Britio/pundo	0,28	5,60	14	8,40	4,20	28
Bulgario/gld.	0,94	18,80	47	28,20	14,10	94
Ĉeĥoslovakio/krono	7	140	350	210	105	700
Danlando/krono	4,80	96	240	144	72	480
Finnlando/marko	2,40	48	120	72	36	240
Francio/franko	3,80	76	190	114	57	380
FR Germanio/marko	1,30	26	65	39	19,50	130
Germana DR/gld.	1,20	24	60	36	18	120
Greklando/draĥmo	28	560	1400	840	420	2800
Hinda Unio/rupio	2,40	48	120	72	36	240
Hispanio/peseto	48	960	2400	1440	720	4800
Hungario/forinto	12,50	250	625	375	187,50	1250
Irlando/pundo	0,30	6	15	9	4,50	30
Islando/krono	10	200	500	300	150	1000
Israelo/gld.	1,14	22,80	57	34,20	17,10	114
Italio/liro	580	11600	29000	17400	8700	58000
Japanio/eno	110	2200	5500	3300	1650	11000
Jugoslavio/dinaro	28	560	1400	840	420	2800
Kanado/dolaro	0,68	13,60	34,00	20,40	10,20	68,00
Korea Resp./ŭono	250	5000	12500	7500	3750	25000
Nederlando/guldeno	1,40	28,00	70	44*	22*	140
Norvegio/krono	3,60	72	180	108	54	360
Nov-Zelando/dolaro	0,64	12,80	32	19,20	9,60	64
Pollando/gld.	0,80	16,00	40,00	24,00	12,00	80,00
Portugalia/eskudo	37	740	1850	1110	555	3700
Soveta Unio/gld.	1,06	21,20	53	31,80	15,90	106
Sud-Afriko/rando	0,48	9,60	24	14,40	7,20	48
Svedio/krono	4	80	200	120	60	400
Svislando/franko	1,20	24	60	36	18	120
Usono/dolaro	0,60	12	30	18	9	60
TARIFO A/gld.	0,90	18	45	27	13,50	90
TARIFO B/gld.	0,80	16	40	24	12	80

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; San-Marino laŭ Italio.

TARIFO A: Bermudo, Honkongo, Kuvajto, Malto, Saŭdi-Arabio, Singapuro, Venezuelo.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

Por ĉiu validas la nuna loĝlando. Ĉiuj kotizoj supre menciitaj validas por la kalendara jaro.

* inkluzivas la enlandan imposton de 4%.

MJ(-K): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 25 jaroj, *Kontakto*)

MA(-K): Individua Membro-Abonanto (kiel MJ(-K), plus revuo *Esperanto*)

SA: Simpla Abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen membreco en TEJO

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof (ne inkluzivas membrecon en UEA)

PT: Patrono de TEJO pagas duoble la kotizon de *Kontakto*

DM: Dumviva membro de UEA pagas por la tuta vivo en unu fojo 25-oblon de la kotizo MA. Oni ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj dum oni ankoraŭ estas malpli ol 26-jara, la revuon *Kontakto*.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

34-jara oficistino deziras korespondi tutmonde. F. Faraĝi, Apt.8 No.3 Kh.20, Amirabad Shomali, Tehran 14399, Irano.

Ĉiu serioza esperantisto legu la gravan verkaĵon *Por multoble pli-vastigi nian movadon*. Prezo: 22 fr. frankoj aŭ 8 poŝtaj kuponoj. Adreso: Ligue «Pro Unesco», 24 ave. de Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris. — Sama adreso: La sukcesaj *Facilaj dialogoj*, similaj al la famaj *Amuzaj dialogoj*. Prezo: 20 fr. fr.

Malkovru Kanadon. Okaze de la 69a UK, estos organizita karavano de Montrealo ĝis Vankuvero dum julio 1984. Por pliaj informoj skribu al s-ro D. Novankovic, P.O. Box 334, Delson, Qué., J0L 1G0, Kanado.

Esperanto-klubo Interklubo Pardubice aranĝos letervesperon fine de novembro 1983. Viajn salutojn kaj korespondpetojn atendas grupo de 30 komencantoj kaj progresintoj, el kiuj dek estas 9- ĝis 10-jaraj gelernantoj. Ĉiu sendaĵo estos respondita. Skribu al: Václav Pithardt, CS-530 03 Pardubice, Dašicka 1217, Ĉeĥoslovakio.

La longe atendita Aŭd-vida kurso por progresintoj ĵus aperis, sukcese elpruvita dum internaciaj Esperanto-lernejoj en Ĉeĥoslovakio, Hungario, Pollando kaj GDR. La kurso, konsistanta el stereokasedo C90, koloraj diapozitivoj kaj tekstlibretoj por la lernantoj, taŭgas por daŭrigaj kursoj, someraj kursejoj, por amuza instruado en kluboj kaj ankaŭ por memlernado. Mendebla kontraŭ 60 rpk. ĉe Stano Marček, Zvolenská 15, CS-036 01 Martin, Ĉeĥoslovakio.

31-jara fraŭlo, diplomito pri la angla lingvo kaj instruisto en gimnazio deziras korespondi kun la tuta mondo pri lingvistiko aŭ iu ajn temo. Fariborz Kuchekizad, No. 2, Juya Alley, Falahati Alley, Saadi Ave., Rasht, Irano.

Pasia profesoro pri edukscienco (kiu eble mortos kun kretopeco en la mano) ĵus lerninte Esperanton deziras korespondi. Filozofiaj, politikaj, literaturaj kaj edukaj temoj ŝatataj. Richard Swerdlin, North Texas State University, College of Education, P.O. Box 13857-NTSU Station, Denton, Texas 76203-3857, Usono.

Ĉu instalu teletajpilon? UEA konsideras eblecojn (kaj bezonojn) instalu teletajpilon en la CO en Roterdamo, unuavice pro kelkaj Universalaj Kongresoj okazontaj ekster Eŭropo. Estus interese scii, kiuj aliaj movadaj instancoj disponas pri aŭ havas aliron al teletajpilo. Bonvolu skribi pri tio al la CO por helpi al ni taksu la ekonomiecon de la ĉi-rilataj planoj. Antaŭdankon!

Se interesas vin lingvaj studoj pri Esperanto, aliĝu al IUEF. Membreco, inkl. de *Filologo*, por 1984: 7,00 gld. (6,25 gld. por 1983). Nova adreso de la "Okcidenta" peranto: R. Moerbeek, Bajonetstraat 78, NL-3014 ZL Rotterdam, Nederlando. Poŝtgira konto 1156545.

Korespondi kaj interŝanĝi fotojn ŝatus 21-jara studento pri juro: Carlos Miranda, Av. Amancaes 633, Urb. Jardines Viru, Bellavista Callao, Lima, Peruo.

Fakuloj pri sporto, bv. kunlabori kun Esperanto-grupo, kiu preparas informlibreton por la Vintraj Olimpikoj en Kanado en 1988: s-ino D.W. Hawley, 3019 Hampton Crescent, Alberta T3E 4R1, Kanado.

20-jara irana esperantisto deziras korespondi pri ĉiuj temoj: Hossein Ghadiri, Box 843, Masjeid-Salaiman, Khozestan, Irano.

Helpu nian administradon! Bonvolu ĉiam mencii vian uea-kodon, kiam vi skribas aŭ pagas al la Centra Oficejo.

Geoffrey Sutton havas novan adreson: Agnietenhof 51, NL-2907 WG Capelle aan den IJssel, Nederlando; tel. (010) 50 74 85 – kaj aparte salutas ĉiujn konatojn en Ĉinio, Japanio, Koreio kaj Kanado.

Irana studentino, komencanto, serĉas korespondantojn tutmonde. Skribu al f-ino Afsaneh-nosleh, Tehran-vila str. 12 West. No. 32, Tehran 14448, Irano.

Aĉetu la diskon (aŭ kasedon) Karnavaleto, por vi aŭ por donaci, ĉe Olivier Tzaut, Arêtes 7, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Pĉk: 23-3656 La Chaux-de-Fonds. Oni mendu skribante sur la ĉekkupono la deziran objekton. Prezo (sendkostoj inkluzivitaj): disko 24 sv.fr.; kasedo 20 sv.fr. (*Tra l' mondo* elĉerpiĝis).

Aŭtodidakte studanta iranano, 18-jara, deziras trovi amikojn en la mondo: Azim Sohrabi, Kuche Kosh-Sorur-Palak 5, Rasht-Kh., Shariati, Irano.

18- ĝis 25-jaraj klubanoj de Esperanto-Rondo "Amikeco" en Wyrzysk, Pollando, deziras korespondi kun samaĝuloj en la tuta mondo. Kontaktadreso: Tadeusz Goebel, ul. Kościuszki 13-2a, PL-89-300 Wyrzysk, Pollando.

28-jara esperantistino interesiĝas pri spertoj rilate bredadon de hundoj "Briard" (francaj ŝafhundoj). Skribu al adreso: Mirka Kosnarová, CS-533 52 Staré Hradiště č. 65, Ĉeĥoslovakio.

Jarlibro 1984 havas la limdaton de la 1-a de januaro 1984. Se delegito volas korekti la informojn pri si, se membro volas iĝi delegito, se oni volas mendi anoncon en la Jarlibro, jam estas tempo agi! Kontaktigu kun via Ĉefdelegito.

30-jara Esperanto-klubo aganta en indifera medio petas helpon por veki intereson, montrante la taŭgecon kaj universalecon de Esperanto. Okaze de la centjariĝo de la urbo Venado Tuerto, la 26-an de aprilo 1984, bv. sendi salutojn, poŝtkartojn, bildkartojn, desegnaĵojn, broŝurojn, revuojn kaj ĉion eblan por ekspozicio al: Comisión Festejos Centenario, Palacio Municipal, San Martín 899, 2600 Venado Tuerto, Argentino.

Vi eldonis libron? Vi proponas turisman vojaĝon? Vi organizas kongreson? Vi vendas diskojn? Vi bezonas bildkartojn el la tuta mondo por ekspozicio? Via klubo jubileas? Vi kreis novan vivfilozofion? En ĉiuj kazoj vi havas mesaĝon por la Movado.

Ne perdu tempon lekante poŝtmarkojn kaj dissendante cirkuleron. Ne kontentiĝu per alineo en via loka bulteno. Rigardu la eldonaĵojn de UEA kaj niajn tarifojn. Plej efike, plej avantaĝe

anoncu ĉe ni

Revuo Esperanto: Nia oficiala organo kaj la ĉefa movada komunikilo; 10 000 legantoj en pli ol 100 landoj.

Revuo Kontakto: Legata en 55 landoj, precipe de junuloj kaj novaj esperantistoj; preskvanto 2 300 ekz.

Jarlibro: Tion ricevas ĉiu membro de la Asocio. Ĝi estas regule konsultata minejo de esencaj movadaj informoj. En 1984 ĝi havos turisman kaj vojaĝan emfazon. La limdato por anoncmendoj estas la 1-a de januaro 1984.

Kongresaj eldonaĵoj: Ricevas tiujn ĉiu aliĝinto al la UK. La limdato por la Dua Bulteno estas la 30a de novembro 1983 kaj por la Kongresa Libro la 30a de marto 1984.

	ANONCTARIFOJ POR MOVADAJ INSTANCOJ EN LA ELDONAĴOJ DE UEA (guldenoj)			
	1/8 p.	1/4 p.	1/2 p.	1/1 p.
Esperanto	85	145	265	500
Jarlibro 1984		70	115	200
Kontakto		40	70	120
Dua bulteno Kongresa Libro 1984		100	150	200

Komercaj kaj turismaj ne-movadaj instancoj pagas la duoblon de la supre menciitaj tarifoj. En *Esperanto* kaj la *Jarlibro* kovrilaj anoncoj kostas duoble. En *Esperanto* kaj *Kontakto* oni ĝuas rabaton de 20% por senŝanĝe ripetita anonco en sinsekvaj numeroj.

anoncigu ĉe ni

Se vi varbas anoncojn de ekstermovadaj instancoj je la duobla tarifo, vi povas ricevi maklerajon de 30% de la prezo de la anonco.

Ĉefdelegitoj kaj Landaj Asocioj havas informilojn kaj anoncmendilojn por *Jarlibro 1984* en Esperanto, la angla, franca, germana, hispana, nederlanda kaj portugala. Mendiloj por *Esperanto* (ankaŭ en tiuj lingvoj) kaj por *Kontakto* estas riceveblaj de la Centra Oficejo.

Eldonejo - librejo SONORILO

- **L'espéranto dans l'enseignement:** d-ro Pol Denoël. 1982 (2a eld). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. 100 BF.
- **Initiation théorique et pratique:** d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. 180 BF.
- **Aerpoŝtaj leterpapero kaj kovertoj,** kun surprisaj stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakajoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj: 145 BF.
- **Gluafilo: Internacia Lingvo Esperanto,** kun homa figuro kaj verda stelo. 7 x 17 cm. 25 BF.
- **Novjaraj gratulkartoj:** kvar diversaj koloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj. Dua eldono. 60 BF.
- **Leksikono de Bovy:** J.P. Bovy. Herstal: APE, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. Vortareto en kvin lingvoj (Esperanto, angla, franca, nederlanda, germana). 240 BF.
- **Eldonejo-Librejo SONORILO** estas peranto de: *Budapeŝta informilo*, *El popola Ĉinio*, *Heroldo de Esperanto*, *Monato*, *Norvega esperantisto*, *Oomoto*. Petu abonprezojn en via nacia valuto.
- **De la 5a de okt. 1983 ĝis la 1-a de marto 1984** nia Librejo aŭtomate donas rabaton de 5%, se via mendo superas la valoron de 500 BF (ekskluzive la sendokostojn). Ni vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromarkato. Al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: 20% por la mendo sub la valoro de 1800 BF, kaj 10% por la mendoj de pli granda valoro. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima landa liveranto aŭ rekte ĉe:

**Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22,
B-2610 Wilrijk (Antwerpen)
Belgio. ☎ (03) 827 24 05.**

Ni estas konataj pro malaltaj prezoj kaj rapida servo!

"Kapablo trafe kaj klare pri-
lumi la kernon de problemoj"

William Auld

La lingva esenco de Esperanto, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 176 p., 21 cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld. plus sendokostoj. Sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

Strebas al ver' – ne POR sed PER...

Marjorie Boulton

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).



Ĉina monata gazeto en Esperanto



varbas abonantojn por 1984

1. Periodo de la abonvarba kampanjo:

Ekde la 1-a de novembro 1983 ĝis la 29-a de februaro 1984. Ĉiu, kiu faras abonon aŭ reabonon en la abonvarba kampanjo, povas profiti rabaton de 20% kaj senpage ricevi koloran kalendaron en Esperanto.

2. Abonprezoj:

(abon-periodo)	(aktualaj prezoj)		(rabatitaj prezoj)	
	Gld.	US\$	GLD.	US\$
1 jaro	16,00	6,00	12,80	4,80
2 jaroj	27,00	10,00	21,60	8,00
3 jaroj	38,00	14,00	30,40	11,20

(La supraj prezoj ne validas en landoj de Azio, Afriko kaj Latin-Ameriko. Legantoj en tiuj landoj bonvolu atenti la enlandan EPĈ-anoncon aŭ konsulti la peranton.)

3. Abonvarbado estas bonvena.

La abonvarbanto povas ricevi de ni ĉinstilajn memoraĵojn kiel donacon.

4. Tuj abonu ĉe via loka peranto

aŭ ĉe Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam (poŝtĉekkonto 37 89 64). Nederlandaj klientoj bonvolu ankaŭ aldoni 4% por la enlanda imposto. Abonebla ankaŭ rekte ĉe la ĝenerala distribuanto: Esperanta Sekcio de Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj (GUOJI SHUDIAN), P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

La varbilon kaj senpagan specimenon ni sendas laŭ peto.

kontakto

facila

stimula

Malkovru la duonojn de la nova **Kontakto**! Stimulaj artikoloj – la duono en facila lingvaĵo. 6-foje jare sur 16 paĝoj. Junuloj membriĝu, aliaj abonu la gazeton por 1984. La tarifoj estas moderaj; vidu p. 179. La kotizperantoj de UEA akceptos vian mendon nun!

Nova kaseto!

Unuafoje en Esperanto! La plej konataj israelaj kantoj (*Hava nagila*, *Haleluja* kaj multaj aliaj), kantitaj de profesia kantistino. 40-minuta kaseto, kun akompana ilustrita libreto (20p. 22cm.)! Prezo: 18,00 guldenoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, aŭ rekte ĉe la eldonisto (kie la prezo inkluzivas sendokostojn): Amri Wandel, Hakalir 15, Tel Aviv 64245, Israelo.



“Vi spertos, ke kiu prezentas originalajn ideojn, novajn eltrovojn, tiu renkontas pli da kontraŭuloj ol da amikoj. Tia estas la homa naturo.”

Delfi Dalmau, Akademiano

Severe, sed noblakore vi kontrolu,

per la verkoj de L. Mimó, ĉu REGULA ESPERANTO ne superas la tradicion, intuician, rutine imitadan Esperanton.

Don Juan' Tenorio

**Du komedioj: Tamen civilizitaj kaj Neĝobulo
Kompleta lernolibro de
Regula Esperanto
Perfektecio de la esperantaj verboj**

Laŭ la Analiza Skolo, logiko estas la fundamento de la *Fundamento de Esperanto*, kaj ĝi donas ĉiam la unikan respondon ĝustan. Tio devus ofendi neniun.